

Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland – Esperanto ann an Alba
Somero 2015 - £2.50/€3



Aliĝu al UEA – Tutkelta Kongreso: Raportoj – 110a Skota
Kongreso: Raporto – Primemoj de John Francis – Ratviro:
Rakonto

Esperanto en Skotlando

Numero 201 - Somero 2015 -ISSN 0014-0643

Redaktoro: Ed Robertson

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw View,

Helpredaktoro: Hju Rid

Edinburgh, EH4 2QP

Administranto: Mia Casey

Telefono: 07970 156549

Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk

La redakcio bonvenigas kontribuantojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de *Esperanto en Skotlando*: 31a de oktobro. Oni sendu kontribuantojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer (senpage havebla de la koncerna retejo). Dokumentoj en la formato Word ankaŭ estos akceptataj. Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj.

Enhavo

Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas! Mark Fettes.....	3
Tutkelta Kongreso 2014: Raportoj.....	4
Adham Smart.....	4
Christian Shtarkov.....	5
Maycon Fernandes.....	6
110a Skota Esperanto-Kongreso, 5an ĝis 7a de junio 2015.....	9
Primemoj de John Francis.....	14
Rat-Viro far Hju Rid.....	18
Mia Patro, John Logie Baird.....	26
Malantaŭ la kulisoj ĉe Duolingo.....	28
Lingvaj Rajtoj.....	33
Tradukaj Defioj.....	37
Kalendaro.....	39

La opinioj esprimitaj en Esperanto en Skotlando ne nepre kongruas kun tiuj de Esperanto en Skotlando aŭ EAS. Esperanto en Skotlando estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando

Prezidanto: Mia Casey

Vic-Prezidanto: Duncan Thomson

Sekretario: David Bisset

Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,
Motherwell, ML1 3AP

Telefono: 01698 263 199

Rete: secretary@skotlando.org

Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas! Mark Fettes

Kiam mi laboris en la Centra Oficejo de UEA en la okdekaj jaroj, ni havis inter sep mil kaj ok mil individuajn membrojn. Nun la membronombro ŝvebas ĉe la limo de kvin mil. Samtempe, tamen, Esperanto disfloras inter multaj junuloj tutmonde, kiuj danke al Interreto fariĝis aktivaj lernantoj kaj uzantoj de la lingvo; kaj ankaŭ mankas en nia vicoj multaj “veteranoj” de la movado. Nia membrovarba kampanjo celas do rekreskigi nian “rondon familian,” kiu praktike kaj simbole konsistigas la kernon de la Esperanto-movado mondscale.

Kial do aliĝi al UEA? Ekzistas multaj bonaj argumentoj por tio. Helpu nin disvastigu ilin—dum landaj kongresoj, ĉe lokaj grupoj, en revuoj, en Facebook, Lernu.net, radioprogramoj kaj en Esperanto-televido. Kaptu ĉiun okazon por menci, ke vi mem estas membro de UEA. Per via helpo, nia monda asocio povos rekapti la fortojn bezonatajn por fronti la defiojn de la 21^a jarcento!

Per aliĝo al UEA, **oni kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto**. Ĉiujare per siaj diversaj fondaĵoj UEA donas konkretan subtenon al asocioj kaj aktivuloj en Azio, en Afriko, en Ameriko; per tiu agado, nia komunumo fariĝas kulture pli kaj pli riĉa, bunta, inkluziva.

Per aliĝo al UEA, **oni plifortigas la voĉon de la lingvo kaj movado**. Estas ĉefe la reprezentantoj de UEA kiuj argumentas por la valoro kaj aktualeco de Esperanto ĉe UN kaj Unesko kaj en diversaj internaciaj forumoj. Tiu agado ankaŭ helpas krei kondiĉojn por sukcesa informado sur lokaj kaj landaj niveloj.

Per aliĝo al UEA, **oni subtenas instruadon de Esperanto kaj trejnadon de aktivuloj**. Interalie, la AMO-seminarioj de UEA donas rimedojn kaj okazojn por vastigi la konojn kaj kapablojn de homoj sur ĉiuj niveloj de la movado.

Per aliĝo de UEA, **oni esprimas solidarecon kun la mondvasta Esperanto-komunumo**. Ĉiujare UEA subtenas kulturajn projektojn diverslande, venigas homojn al kongresoj kaj seminarioj, kaj membrigas junulojn el malriĉaj landoj por doni al ili senton de aparteno al la internacia komunumo. Ofte la dankmesaĝoj de tiaj junuloj al la CO estas ege kortuŝaj.

Kaj ni ne forgesu, ke **UEA-membreco ankaŭ donas personajn avantaĝojn**. Inter ili aparte menciindas forta rabato al Universalaj Kongresoj, 10%-a rabato en la Libroservo, kaj abono al la Gvidlibro aŭ Jarlibro kaj la revuo Esperanto, papere kaj rete. Por aktiva esperantisto, tiuj estas nemalhaveblaj rimedoj por partopreni en la movado en tutmonda skalo.

Ne mankas argumentoj. Ni disvastigu ilin! Farante tion, tamen ne forgesu pagi vian propran kotizon—eĉ ankoraŭ por la jaro 2014! Kaj pagante por la jaro 2015, la jaro de la 100^a Universala Kongreso, memoru samtempe pri la ekzisto de aliaj kategorioj per kiuj oni speciale povas subteni UEA, kiel Societo Zamenhof, Dumviva Membreco aŭ Patronoj de TEJO. Per donacoj al Fondaĵo Canuto vi povas subteni homojn el malriĉaj aŭ nepagipovaj landoj.

Ek al rekorda kresko de nia membraro en 2015!

Tutkelta Kongreso 2014: Raportoj

Okazis unika Esperanto-evento dum la somero de 2014 en la montara urbeto Pitlochry. Sekvas nun tri individuaj perspektivoj pri plej ĝuinda somera semajnfino.

Adham Smart

“Bone, kiom da profundfrititaj Marsoj?”

Kiam mi eksciis pri la Tutkelta Kongreso kiu okazontis en Pitlochry, skota turisma urbeto ĉe rivero kaj montaro, mi senhezite decidis iri — ĉu kredeble, ke mi jam loĝas en Londono dum dekkvar jaroj kaj neniam vizitis Skotlandon? Pro pigreco kaj timo pri la malfacilkompreneblaj akĉentoj de niaj najbaroj, Skotlando estis malpreciza, nuba fantazio por mi, sed nun estis la ĝusta tempo por realigi la sonĝojn, kaj la ĝusta ilo por fari ĝin estis Esperanto.

Venis la sesa de junio, kaj alvenis mi al la stacidomo por komenci la vagonarveturadegon Skotlanden. Je tiaj momentoj mi ne scias, ĉu mi preferas la vojaĝon aŭ la cellokon. Dum la vagonaro trapasis la urbojn Jorko, Novkastelo, kaj Berwick-upon-Tweed, videblis la ŝanĝo de la geografia konsisto de la tero — ni forlasis la platajn verdojn de la sudo kaj trovis nin irinte trans la ŝtonan, montetan kamparon de la nordo de Anglujo kaj Skotlando. Mi devis ŝanĝi la trajnon en Edinburgo, do mi profitis de la horo kiun mi havis kaj trinkis kafon je la suno. Fine, mi alvenis en Pitlochry la malfruan postagmezon, trovis mian loĝejon, kaj ekis al la kongresejo, la Scotland’s Hotel, alveninte pinte kiam ĉiuj vespermanĝantis.

Post la vespermanĝo, David Bisset nin bonvenigis al Pitlochry per detala enkonduko al la historio de la urbo, sekvita de prelego de Paul Harry Barron pri kimraj manĝaĵoj kun gustumado de memfaritaj bongustegaj kuketoj. Nature, la posta celo estis trovi trinkejon, kion mi kaj iuj samideanoj sukcesis fari, kaj du aŭ tri horojn poste mi hejmeniris por ripozi antaŭ la oficiala komenco de la kongreso la venontan tagon.

La unua prelego kiun mi ĉeestis la venontan tagon estis tiu de Girvan McKay pri la gaela lingvo — interese prelego pri lingvo, pri kiu oni devus scii pli en Anglujo. Ĝi sekvis de la skota bankedo, pri kiu mi jam antaŭĝojis dum antaŭaj tagoj, ĉar estos mia unua fojo manĝi hagison kaj en tre taŭga etoso. Tute tradicie, ni aŭskultis sakŝalmudadon antaŭ ol oni elirigis la hagison, kaj antaŭ ol ni manĝis ĝin, S-ro Bisset prenis grandan tranĉilon kaj kuraĝege mortigis ĝin laŭ la tradicia(?) maniero. Post la bongusta bankedo, estis muzika sesio kun ludadoj de originalaj verkoj kaj denova sakŝalmumo. Daŭrigante la keltan temon, la venonta prelego fokusis pri la kimra lingvo, S-ro Barron denove edukante nin pri la eco de sia devenlando. Mi iomete promenis tra la urbo inter la prelego kaj la vespermanĝo, kaj post kiam ĉiuj manĝigis la korpon estis la tempo por manĝigi la animon — ni tradancis la nokton je la muziko de skota grupo kiu instruis al ni tradiciajn dancojn kiel la Gay Gordons kaj la Dashing White Sergeant.

Dimanĉon la okan mi matenmanĝis kaj laboris hejme ĝis la tagmezo, kiam mi kunvenis kun la aliaj kongresanoj por tagmanĝi. La posta prelego de Ed Robertson pri la skota lingvo estis tre

eduka, specife la dialektaj variaĵoj kiuj troveblas en diversaj partoj de la lando. La sekva aktiveco de la tago por ĉiuj tiuj kiuj ne ĉeestos la Grundtvig-Seminarion estis tre agrabla traŭra promenado. Ni transiris la riveron Tummel, trapasante la mirindan fiŝoŝtuparon, trinkis kunviskian kakaon ĉe trinkejo apud la fama Festivala Teatro de Pitlochry, kaj revenis al la urbocentro ĵus antaŭ ol vere aperis la pluvo. Post la vespermanĝo mi babilis iomete kun pajnto en la mano, sed sufiĉe frue hejmeniris por daŭrigi la skribadon. Jen la rokenrola vivstilo!

Mi ne ekskursis la sekvan tagon, tamen aĉetis poŝtkartojn (mia ŝatokupo) kaj skribis al amikoj en Anglujo. Pensante kunveni kun la ekskursintoj por la tagmanĝo ĉe la bierfarejo de la apuda vilaĝo de Moulin, mi ekis tien, sed survoje vidis amason da esperantistoj kontraŭvenantaj! Mi ne tre argumentemas — mi simple aniĝis kaj sekvis la aron reen al la urbo. La celo estis tagmanĝi fritaje, kaj kompreneble, ĉiuj havis unu aferon en siaj mensoj: la legenda profundfritita Marso. Malfeliĉe, tiu delikataĵo ne troveblis, kaj anstataŭe mi manĝis hagison en proksima kafejo. Tamen, mi decidis ne tute maltrafi la okazon gustumi la lokajn bierojn de Moulin, do por la vespermanĝo mi denove iris tien. Mi ege ĝuis la vesperon; la manĝaĵo kaj bieroj ĉe la historia Moulin Hotel estis bonegaj, kaj la servistoj ankaŭ tre afablis, kvankam mi ja iom diskutis kun emeritulo sidinte ĉe la baro kiu, ni diru, ne tre entuziasmis pri la multkulturismo kaj la miksado de rasoj. Tamen, fine, la rezulto estis ke mi ricevis senpagan viskion de la viro, danke al lia maltrankviliĝo, ke li ofendis min. Mi marŝaĉis hejmen tra la mallumon, kantetante kaj laŭdante la povon de la alkoholo por kunigi la homojn.

Mardo dolore matenis. Bonŝance nek tiam mi estis ekskursonta, do al mi eblis vekiĝi je mia rapideco. Post forpeli la demonetojn mi iris al la kongresejo por tagmanĝi kaj trinki fortan kafon. Tamen, malgraŭ mia stato, la tri prelegoj kiuj okazis dum la lasta tago de la kongreso estis vere ĉeestindaj. Michael Boris Mandirola informis nin pri la prakeltoj de la sudaj Alpoj, pri kiuj mi ne sciis nenion antaŭe; Bert Schuman igis la aŭskultantaron diskuti la temon de Esperanta kaj lingva politiko; kaj — la elstara afero por mi — la pasia kaj elkora prelego de Nicola Ruggiero pri la poezio de William Auld. Mi faris mensan noton por aĉeti por mi ekzempleron de En Barko Senpilota kiel Kristnaska donaco ĉijare.

Bedaŭrinde mi devis forlasi la prelegon de S-ro Ruggiero antaŭ la fino por trafi la noktvagonaron, la Kaledona Dormanto, reen Londonen, kun mia kompleto en la sako por la morgaŭa laboro. Tamen ankoraŭ estis mirinda sperto por mi, eĉ se mi baldaŭ dormis kaj sonĝis strangajn aferojn; verdokulajn prakeltojn fiŝkaptante ĉe fiŝoŝtuparo; esperantistojn distilante viskion en ventbatata skota kastelo; sakŝalmistojn postkurante sovaĝajn hagiojn tra malluma arbaro; kaj vagonarojn, manĝante la kilometrojn, naĝante tra la distancon kiel fiŝoj en montaj riveretoj.

Christian Shtarkov

La 1-an Tutkeltan Kongreson partoprenis Christian, bulgaro studante en Skotlando.

Dank' al la subvencio, kiun mi riceveis de NoJEF, mi havis la eblon ĉeesti la 109-an Skotan Kongreson en Pitlochry, Skotlando, kiu estis samtempe la 1-a Tutkelta Kongreso. Mi jam estis

ĉeestinta aliajn kongresojn internaciajn, sed tiu estis mia unua en Skotlando, kaj verŝajne unu el la plej interesaj.

Por mi la kongreso kaj esperantumado komenciĝis ne en Pitlochry, sed en Glasgovo, kiam mi renkontis mian Brazilan amikon apud la stacidomo por veturi kune trajne al la kongresa urbeto. Kiam ni finfine alvenis post agrabla vojaĝo, mi tuj renkontis alian kongrespartoprenanton, kiu hazarde loĝis en la sama junulargastejo kiel ni. Do, la kongreso ankoraŭ ne estis formale komenciĝinta, sed jam la esperantumado plenfajris.

Post mallonga promeno tra la urbo kaj la ĉirkaŭaĵoj, ni iris al la kongresejo por la solena malfermo kaj renkonti la aliajn. En la akceptejo de la kongresejo, de granda distanco mi vidis vizaĝon, kiu aspektis al mi iom konata, kaj mi vidis ke ĉi tiu vizaĝo havas la saman senton je ĝi. Tiu estis, bonŝance, mia malnova amiko de alia kongreso, kiun mi ne tuj rekonis pro la manko de la impresiginta barbo, kiun li havis antaŭe. Mi ĝojis ke estis bona nombro de junuloj, precipe de Italio, kaj ke eĉ mi konas iujn.

Unu el la plej bonaj aferoj dum la kongreso certe estis la prelegoj. Mi estis loĝanta en Skotlando jam tutan jaros, sed dum tiu semajno mi ekkonis multe pli pri la skota kaj kelta kulturo, ol kiom mi lernis dum mia tuta tempo kiel studento tie. Mi tute ne sciis pri la interligeco de ĉiuj keltaj kulturoj. Mi finfine klopodis danci skotajn tradiciajn dancojn. Kaj mi finfine provis manĝi tiun timigan, almenaŭ al mi, manĝaĵon - hagison. Je mia surprizo, ĝi estis tre bongusta kaj post la unua gustumero mi tuj trankviliĝis. Ĝi estis servita dum la skota bankedo, kun la tradicia ceremonio de "mortigante" la hagison - oni simple pikis ĝin per tranĉilo antaŭ ol kuiri.

Estis ekskurzoj dum la kongreso - montgrimpado, vizitado de bierfarejo kaj de viskidistilejo, kiu troviĝis apud la urbo. Mi ĉeestis nur la lastan. Mi jam havis ideon pri kiel oni faras viskion, sed mi almenaŭ vidis kiel aspektas la enon de distilejo, kaj lernis iom da fakvortoj esperante. Ĝi estis speciala, ĉar, laŭ la laboristoj tie, ĝi estas la plej malgranda skota distilejo. Fakte, pli ĝojiginta estis ne tiom la distilejo mem, sed la ĉirkaŭa naturo. Pasinte nur la aŭtunon, vintron kaj printempon en Skotlando, tiu estis mia unua somero, kaj mi tute ne sciis, ke ĝi povas esti tiom bela! Plena je verdo, tre trankvila kaj samtempe histori plena pejzaĝo.

Kiam ni ne aŭskultis prelegojn, promenis ekstere aŭ simple ripozadis, ni verŝajne estis en la kongresa drinkejo, havante interesajn konversaciojn pri politiko, lingvoj, landoj, kutimoj, Esperanto kaj multe da aliaj stultaĵoj. Pro tiuj oftaj renkontiĝoj ĉe la drinkejo kulpis la bongustan skotan bieron.

Bedaŭrinde, ĉio rapide finiĝis, ĉar mi devis foriri du tagojn antaŭ la oficiala fino. Dankinde mi havis la eblon adiaŭi ĉiujn, kaj mi esperas ke mi ne maltrafis multon post mia foriro. Tiu estis bonega kaj riĉiga evento, kaj mi ne povas atendi denove ĉeesti similan aferon.

Maycon Fernandes

La 1-a Tutkelta Kongreso ankaŭ estas la unua en Britio de Maycon, brazilano studante en Skotlando.

Dank' al The Norwich Jubilee Esperanto Foundation - NoJEF, mi ĉeestis tiun tre kulturplenan kaj ĝojan kongreson en Pitlochry. Feliĉe, mi ricevis NoJEF-an subvencion por partopreni dum tuta evento. Fakte, ĝi estis la unua Esperanta kongreso for de Brazilo en kiu mi partoprenis. Do, mi certas ke ĝi estis ja bonega komenco.

Ekde la unuaj minutoj mi konatiĝis kun gejunuloj precipe el Italio, kiuj estis partoprenantoj de seminario parte de Grundtvig Eŭropa Unio programo. Nekredeble ili estis pli multnombraj ol la Britaj gejunuloj, kiuj bedaŭrinde ne partoprenis tiun kongreson. Laŭ mia opinio, tio signifas ke mankas varbado de junaj parolantoj de la internacia lingvo en Britujo.

Kiel parto de Tutkelta kulturo, dum la tuta evento oni multe spektis prelegojn pri keltaj lingvoj kiel ekzemple Gaela, Skot-Gaela, Irlanda, Kimra kaj diskutadon pri la Angla lingva influo en la malpligrandigo de la nombro de parolantoj de tiuj lingvoj. Ĝenerale, estis menciita ke la registaro de ĉiu lando ja klopodas konservi ĝin kiel parton de la loka kultura identeco. Ekzemple, en Skotlando oni havas tri oficialajn lingvojn: la Anglan, la Skot-gaelan kaj la Skotan. Tio jam signifas oficialan prizorgadon al ne-difektiĝo de minoritataj lingvoj. Laŭ la prelegantoj de malsamaj keltaj landoj, same okazas en la aliaj por garantii la ekzistadon de iliaj lingvoj krome en Bretonio. La bretona preleganto diris ke la Franca registaro ne multe agas por konservi la Bretonan lingvon. Fakte, ekde mia alveno en Skotlando, de unu jaro antaŭe mi eĉ ne sciis pri tiom da kultura identeco inter keltaj nacioj.

Je la 1^a tago, vendredo, mi alvenis en hostelon kie mi restis dum kvin tagoj de la kongreso. Ĝi nomiĝas Backpackers Scotland, kiu bonŝance estis tre proksima al la kongresejo, proksimume je 500 metroj. Ankaŭ Christian kaj Sasha, anoj de Juna Esperanto Brita (JEB) kaj Tutmonda Esperanto Junulara Organizo (TEJO) restis je la sama hostelo. Pro nia samloka loĝejo, ni manĝis ĉe la sama tablo ĉiutage. Do, kiel kutime okazas en junulargastejoj, gejunuloj tre facile konatiĝas kun aliaj. Do, la aliaj loĝantoj de la loko, sciante ke ni tri estis unu Bulgaro, unu Ukrainino kaj unu Brazilano tute ne komprenis kiel ni interparolis ĉar ili ne rekonis la lingvon. Konsekvence, ĉiutage iu demandis: kiun lingvon vi uzas por paroli unu al la alia? Tamen, Christian kaj mi interkonsentis pri ĉiufoje unu el ni respondus la demandon, tiel oni lernus pri pluraj eksplik-manieroj al la sama demando.

Reen al la unua tago, je la 5^a horo kaj duono post-tagmeze, oni estis akceptata tre Skote kun viskio, teo kaj kafo, kiam ankaŭ estis la unua momento por vidi ĉiujn kongresanojn kaj babili antaŭ la 'Enkonduko al Pitlochry' prelegita de David Bisset, sekvita de 'Kimraj manĝaĵoj', prelegita de Harry Barron.

Rigardante la programon je la unua nokto, mi rimarkis ke tiu kongreso estus tre amuza ĉar la organizantoj kapablis miksi prelegojn, ekskursojn, kunmanĝadon, teo-/kafo-paŭzon kaj promenadojn tra la urbo en unu ĝojinda kaj plenaktiveca semajno.

Sabate, oni komencis spekti prelegon je la deka matene kiu estis sekvita de la 'Malfermo', kiam Francesco Maurelli informis nin ke ĉe la evento estis gepartoprenantoj de dek kvar landoj. Tamen mi sciis kaj tute ne surpriziĝis pri la fakto ke mi estis la nura persono el Suda Ameriko tie. Pli precize, mi estis la nura ne-Eŭropano kaj bedaŭrinde mi havis nenion keltan ĉe mia kultura bazo por prezenti. Do, kion fari? Profiti la Tutkeltan etoson por lerni pri tiaj kulturoj, diversecoj kaj precipe

similecoj, kiuj unuigas personojn de ses nacioj: Irlando, Skotlando, Manksa Insulo, Kimrio, Kornvalo kaj Bretonio.

Ĉar tiu kongreso estis ankaŭ Skota kongreso, je la dua tago ne mankis gustumado de tre bongusta kaj tradicia skota manĝaĵo. Provu diveni kio ĝi estis? Hagiso! Tiam, pro la tradicio, oni aŭdadis ŝaksalm-ludadon kaj spektis David Hannah bonvenigante kaj mortigante la hagison. Mi ne povas forgesi mencii ke la Skotoj survestigis sin kiel oni esperis - kiltoj de pluraj kaj belaj Tartano-tipoj estis videblaj ĉe la kongresejo.

Dimanĉe, krom la prelegoj, oni promenis tra la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵoj. Tiel ni vizitis unu el la plej vizitindaj lokoj de la urbo, kiu estas la akv-baraĵo, la fiŝ-ŝtuparo, la festivala Teatrejo, ĉiuj ĉe la rivera apudaĵo. Tie oni trovis tre ĉarman kafejon/trinkejon/restoracion kie ni sidis por gustumi trinkaĵojn kaj trinkaĵojn kaj babili post ne tre longa marŝado.

Vespere oni spektis bonan muzik-prezentadon de Patrik Austin (Finlando) kaj Sepa de Asorti (Litovio) ĉe muzika vespero.

Lundon, la 9^a estis ja ekskursita tago! Tial oni vizitis Viskidistilerion Edradour, Bierfarejon Moulin kaj ankaŭ montgrimpis la Ben Vrackie. Tiu montgrimpado estis tre speciala al mi, ĉar estis la unua monto kiun mi surgrimpis. Ĝi estas en la regiono Perthshire apud Pitlochry kaj ĝi altecas 841 metrojn. Pro la tre malvarma vetero dum la vojo, estis malfacila grimpado al mi ĉar mi ne estis taŭge vestita por tion fari. Mi bazis mian vestaĵon je la nuntempa suna vetero, sed tre naive ĉar evidente (post la sperto) la vetero en altaj altitudoj estas tute malsama ol en malaltaj.

Mardo estis la tago por koni la najbaran Kastelon Blair Atholl, al kiu ni trajnvojaĝetis (3 stacioj) kaj sincere mi pli ŝatis la eksteran parton ol la internajn. Mi diras tion ĉar kutime kasteloj estas similaj kaj ne multe plaĉas al mi kvankam ĉe la ekstera parto estis trovebla tre bela ĝardeno kie oni povis enspiri tre bonkvalitan freŝan aeron kaj vidi grandegajn (probable tre maljunajn) arbojn kaj grandan diversecon de floroj kaj aliaj arbedoj.

Finfine, je la lasta tago okazis nur mallonga fermo. Tamen ĝi estis la oportun-momento kiam la partoprenantoj sugestis ideojn por la venontaj kongresoj. Do, estis sugestitaj du lokoj kiel ebleco por la 2a Tutkelta Kongreso, jen Bretonio aŭ en Kimrio. Kvankam ĝis nun estas du opicioj, plibonŝancas ke ĝi okazos en Bretonio-Francio kune kun alia loka renkontiĝo kiu estas jara evento. Por klarigi tiun pligrandan okaz-probablecon, tio estas influo de entuziasmaj Esperantistoj el Bretonio, kiuj volas okazigi ĝin tie. Alia parto de tiu fermo estis demando pri kiom ofte la Tutkelta kongreso okazeblus kaj konsekvence multaj personoj opiniis ke ĉiu dua jaro estus bona frekvenco.

Tiu fermo okazis en la mateno de merkredo, la 11a de junio. Tuj post ĝi mi iris al la junulargastejo por redoni al ili la ŝlosilon kaj preni mian ŝultrosakon. Mi tiel faris kaj foriris al Glasgovo. Feliĉe estis suna tago kaj pro tio mi multe ĝuis la pejzaĝon tra la trajna vojo. Mi atingis Glasgovon je la 1a kaj duono.

110a Skota Esperanto-Kongreso, 5an ĝis 7a de junio 2015

La urbo Helensburgh belegas. La pleja parto konsistas el grandaj domoj konstruitaj el sabloŝtono laŭ impona 19a jarcenta stilo. La unua kvartalo estis starigita en 1776 kiel sanbanejo, kaj poste riverborda feriarbo. Dum la sekvaj jaroj la urbo pligrandiĝis ĝis ĝi atingis la deklivon malantaŭ ĝi kaj poste domoj rampis laŭe supren. Nia kongresejo iam estis unu el tiuj kaj prezentis al ni okulĝojigan panoromon super la estuaro de la rivero Clyde (Klajd) de la fenestro en la prelega ĉambro.



Moja Makaj parolas 'Pri Nenio'

La semajnfina kunveno estis plaĉe internacia kun kvin homoj el Pollando – kiuj partoprenis kiel partneranoj en la dujardaŭra projekto Elloke Tutmondan* en kiu EAS estas ankaŭ partnero – unu virino el Armenio kaj Usona geparo el la urbo Seatlo.

La kongreso malfermiĝis la vesperon de la kvina de junio per fascina parolo far David Bisset pri la historio de la urbo. Poste Moja Makaj regalis nin per ridiga prelego pri nenio – efektive la titolo estis 'Pri Nenio'!

La kongresanoj manĝis vespere en la urbocentro – grupo de Poloj frandante por la unua fojo baratan manĝaĵon.

Malgraŭ la aŭspicio de la bela vetero vendredan vesperon, pluvis la tutan tagon sabate. Matene efektive ne tre gravis ĉar ni sidis endome aŭskultantaj prelegon de Przemek Wierbowski kiu pentris por ni interesan bildon pri Esperanto kaj kino (kaj pri kino kaj Esperanto). Nu pluva vetero ekstere konvenis al la temo, ĉar kino estas okupo kiun ni kutime faras endome! Post kafaŭzo ni ĉiuj – dudek du entute - iomete malĝoje pro la pluvo enbusiĝis por vojaĝi al la historia vilaĝo Luss, sur la okcidenta bordo de lago Lomond. Estis iom ironie ke la nura tago de la semajnfino kiam pluvis, bonvenigis nin al unu el la plej belaj lokoj en Skotlando – kiun ni ne povis vidi pro la akva vualo antaŭ ĝi. La eksterlandaj vizitantoj, tamen, vidis ĝue la spektaklon de skota geedziĝa ceremonio kiu okazis en la pitoreska vilaĝa preĝejo. La, por ni iom ordinara, vido de viroj en tartanaj jupoj estis por ili maloftaĵo.

Revininte al la kongresa hotelo kaj kafaŭzo, nin regalis Girvan Makaj per prelego pri lingvaj rajtoj. Sekve de tio la kongresanoj ĝuis interesan ludon aranĝitan de Jack Warren. Ĉiuj ricevis liston de enigmaj priskriboj kiujn ili devis parigi kun fotografioj de famaj homoj el la pasinteco kaj nuntempo.



Norman Richardson, Diana Richardson (la filino de John Logie Baird), kaj Ed Robertson dum la kongresa manĝo

Ni finis la tagon per bongustega bankedo en la hotelo Commodore. Je la fino de tio Diana Richardson parolis pri sia patro, John Logie Baird, la inventinto de televido, kiu loĝis en la urbo Helensburgh kiel juna homo.

Dum dimanĉo okazis du jarkunvenoj, tiu de EAS kaj tiu de la Glasgova Esperanto-Societo – GES ne povis kunveni en sia kutima kunvenejo pro inundo kaŭze de konstruo-laboro en apuda domo.



Armenianino, Polinoj, kaj Skoto ĝuas sunbrilon en la ĝardeno de la "Monteta Domo" (The Hill House).



Arlyn Kerr el Sealto rigardas mirigite dum skotaj frenezuloj plonĝos en Lago Lomond

Arlyn Kerr prezentis lumbildojn pri la boatodomo de ŝi kaj sia edzo Les. Ĝi flosas preskaŭ tutjare en lago apud ilia hejmurbo Sealto.

Sekvis vizito al tute alispeca domo – la tiel nomata Monteto Domo desegnita de la fama arkitekto Charles Rennie Mackintosh. Ĉiuj ĝuis vidi la novartan stilon de la doma interno mem kaj la ĝisfundan laboron de Mackintosh kiu desegnis ĉiujn meblojn, lampojn, murornamaĵojn, tapiŝojn ktp ĝis eĉ la manĝilaroj.

Mia Casey, la ĉi-jara prezidanto, fermis la kongreson dankante ĉiujn kontribuantojn, vizitantojn, kaj ĉiujn kongresanojn.



Sakšalmisto ludas preludo al la elveno de geedziĝa ceremonio en la preĝejo de Luss

Hju Rid

* Sub la aŭtoritato de la projektaro Grundtvig (nun Erasmus+)

Primemoj de John Francis

En 2005 okazis la 100a Skotlanda Kongreso de Esperanto. Oni invitis al John Francis prelegeti pri si, ĉar oni malkovris dum konversacioj kun li en kunvenoj de la Glasgova Esperanto Societo ke li posedis abundan trezoron de memoroj pri si mem kaj pri aliaj famuloj de nia movado. Jen la notoj de lia tiama prelego.

15/2/24 – naskiĝis en Cambuslang, kvankam la permanenta hejma de mia patrino estis en la vilaĝo Ashton, apud Oundle.

1926 (Ĉar dum la ĝenerala striko) – miaj gepatroj disiĝis. Mia patrino reiris al la domo de sia fratino en Cambuslang (kun mi, kompreneble). Ili kverelis, kiel ili ŝajne ofte faris, kaj ni translokiĝis al alia onklino mia, en Springburn. Mia patrino, kiu ricevis nenion de mia patro, reiris al domservo, kaj mi restadis kun miaj geonkloj en Springburn.

Tie me estis tute kontenta. La familio de miaj tri kuzoj loĝis en la etaĝo sub ni, kaj la meza el ili estis knabo nur iomete pli juna ol mi. Sed fakte la tuta strato estis kvazaŭ familio; mi neniam aŭdis pri grupoj de infanoj kiuj tiel amikeme kunrilatis. Oni ludis ĝenerale kun propra aĝgrupo, sed de tempo al tempo ĉiuj, de antaŭlernejuloj ĝis eble dekdujaruloj, kunvenis por ĝenerala ludo, kiel ekzemple “rounders”. Kay Street estis mallonga strato, kun eble ses aŭ ok ĝeneralaj enirejoj sur ambaŭ flankoj, kaj finiĝis je konstruaĵo kun publikaj banejoj kaj naĝejo. Parto de ĝia folkloro estis la okazo kiam Molly Stewart batis la pilkon de la baneja fino, laŭlonge de la tuta strato, super Springburn Road, je la alia fino, kaj super la tegmento de “Bells” bonbonejo ĉe la kontraŭa flanko de Springburn Road. Babe Ruth? Pa!

La pli aĝaj geknaboj ankaŭ organizis diversajn spektaklojn, kiujn ni rajtis kunesti kontraŭ pago de penco aŭ duonpenco por petardoj aŭ simile, sed kiam oni ne havis pencon, ili simple ignoris la fakton. Ili estis eksterordinare afablaj. La knaboj iel akiris malgrandajn – por ne diri miniaturajn – boksogantojn, kaj instruis nin kvin-aŭ-sesjarulojn. Je unua bato sur la nazo mi aŭtomate forturnis la kapon, sed la urĝaj “Ne turnu la kapon, John,” plenefikis, pro mia respekto al ili. Alivorte, mi preferis la doloron ol la honton, kaj tio poste tre utilis.

Por esti vere unu el ili mi strebis perdi mian anglan prononcon, kaj fine sukcesis, sed ne povis eviti malsanojn. Mi suferis de morbito – ambaŭ specoj, kaj parotito kaj varicelo je sama tempo. Pli grave: dum mi feris kun mia patrino – ĉar ŝi rajtis ke mi faru tion – mi sentis doloron en la ventro, kaj unu flanko tre sensitiva je la kuracista ektuŝo. Por tio li preskribis kulerojn de varma olivoleo. Tio havis ne surprizan efikon, kaj li fine diagnozis apendiciton, aldonante gaje ke tio ne estas grava.

La malsanulejo ĉe Yorkhill havis kontraŭan opinion, kaj operaciis tuj post mia alveno por peritonito, sed la operacio ne estis sukcesa, kaj oni certigis al mia patrino ke mi ne vivos. Kiam mi vivadis, ili klarigis ke tio estas pro mia forta volo iri hejmen. Pri tio ili pravis. Ili denove operaciis, sed la operacio denove malsukcesis. Fine, post ses semajnoj, oni permesis al mi iri hejmen, sed mi devis restadi enlite ĉar la vundo ne kuraciĝas. Dum monatoj tiel estis ĉe Springburn kaj ĉe mia

patrino. Mia plej malagrablaj memoroj el tiu periodo estis kiam la kuracisto en Springburn, kiun mi ĉiam opiniis tiel afabla, puŝis broseton kun jodo en la truon en mia ventro, kaj iam poste kiam iu faligis kudrilon en ĝin por trovi kiel profunda ĝi estis. Oni fine decidis ke ĝi neniel progresas, kaj resendis min al malsanulejo, ĉifoje al la Victoria.

Tie mi estis multe pli feliĉa. Fakte, mia patrino skribis al la intendantino plendante ke la flegistinoj tro indulgas min. Tio estis vera, kaj klarigis kial mi estis multe pli feliĉa. Tamen mi ja ricevis batojn: alia knabo kaj mi, kiam ni jam plisaniĝis, grimpis super la verando por interŝanĝi neĝobulojn ekstere ... La flegistino kiu kaptis min tenadis mian manradikon per unu mano, kaj per la alia bone regalis min. Malgraŭ mia junaĝo, mi konstatis ke estas timo kiu aldonas al ŝi forton.

Mi estis en la Victoria dum pli ol kvar monatoj, kaj dum tiu tempo oni eltranĉis miajn tonsilojn, ĉar tiutempe tonsileltranĉo furoris en la kuracista mondo, kiu certigis al dubantaj laikuloj ke tonsiloj havas neniu efektivan funkcion. Kaj antaŭ ol mi reiris hejmen mi havis aventuron dum mia restado en la resaniga domo en Largs; nome, mi falis de unu el tiu moveblaj ĵeteoj en la maron, kaj viro devis eniri sufiĉe profunde en la akvon por eltiri min. Mi esperas ke on dece dankis lin, sed memoras nur ke post bano oni donis al mi kuleregon de ricinoleo kaj sendis min al la lito. Mi neniam sciis ĉu tio estis kuraco aŭ puno.

Mi ne longe restadis en Springburn post mia liberiĝo de la malsanulejo. Mia patrino luis domon en Woodlands Road kun espero starigi gastodomon. Bedaŭrinde, tio daŭris nur unu jaron: la edzofilo de la familio kiu loĝadis kun ni mortis, kaj loĝonto kiu konstante prokrastis sian alvenon fine anoncis ĝin kiam mia patrino jam malluis la domon. Do ŝi reiris al sia antaŭa posteno, kaj mi iris al ankoraŭ alia onklino – ĉifoje en Helensburgh.

Mi restadis en Helensburgh dum naŭ jaroj, kaj dum tiu periodo mia lerna kapablo draste degeneris. Dum miaj finaj klasoj en la junula lernejo, kaj mia unua duonjaro en la gimnazio mi facile sukcesis, kaj fakte gajnis la klasan premion, sed kiam min frontis lingvolernado malforto baldaŭ manifestis sin. Mi neniam kutimis fari hejmajn taskojn, krom kiam temis pri ia skribado aŭ parkerado, kaj naive kredis ke miaj amikoj same agas, ĉar ili diras tion, sed kompreneble lingvolernado postulas pozitivan lernadon, kaj malkontentigaj rezultoj baldaŭ ekmanifestis sin en miaj ekzamenoj. Kempreneble multaj aliaj gimnaziaj fakoj postulas saman disciplinitan sintenon, kaj la fina rezultato estis ke oni ne permesis min entrepreni la finajn ekzamenojn.

Antaŭ tio mi renkontis Bill Auld. Li venis al nia gimnazio en 1941, kaj mi fine renkontis lin kiam mia amiko kaj mi renkontis alian amikon de ni ambaŭ en kafejo, kaj Bill estis kun li. Ni sidis kune, kaj kiel okazis, miaj du amikoj frontis unu la alian, kaj mi fontis Bill. La konversacio fariĝis iom fragmenta, kaj Bill kaj mi estis parolanta unu al alia, ĝis ni tuŝis temon tre karan al ni ambaŭ – spritan ĵurnaliston kiu havis tre individuan talenton. Ni fariĝis tiel ekscititaj ke ni ekstaris por paroli super la konversacia fluo de la aliaj du, kaj tio rezultigis je simpatia kunrido ...

De tiam Bill kaj mi estis ĉiam en la sama grupo de amikoj, sed ni ankaŭ havis apartan intereson pri poezio kaj pri militludo kiun mi inventis, kiu pli kaj pli postulis sociajn fonojn kiuj inkluzivis individuajn lingvojn. Mi devis inventi mian, kiu baziĝis sur latinaj vortoj kun simpligita gramatiko, sed Bill havis Esperanton, kaj baldaŭ provis persvadi al mi lerni ĝin. Kiel okazis, mi enamiĝis je la

hispana lingvo kiam mi estis knabo pro la hispanaj frazoj kiuj aperadis en la vakeraj-kaj-indianaj rakontoj kiujn mi tiam legis, kaj ili ŝajnis al mi tiel belegaj kompare kun la francaj kaj anglaj ekvivalentoj ke mi sopiris koni la lingvon. Do mi promesi lerni Esperanton se Bill kunlernos kun mi la hispanan. Bill konsentis, kun la rezulto kompreneble ke mi fine lernis Esperanton.

Kiam ni lasis la lernejon, Bill iris al universitato, kaj mi atendis alvokon al la flugarmeo. Mi akceptiĝis post intervjuo, ktp, en Dumbarton, sed devis sekvi dutaga serio de testoj kaj intervjuoj en Edinburgo por konfirmi flugan karieron. Tio ne okazis malgraŭ enketoj kaj leteroj al diversaj instancoj ĝis post jaro, kiam mi fine trovis, ke ĉar mia unua akcepto estis en Dumbarton kaj mi poste translokiĝis al Cambuslang, oni devis sendi certan karton al Motherwell, sed en la Motherwell oficejo ĝi falis malantaŭ breto. Do mi ne povis dungiĝi ĉar mi estas juna kaj virseksa, kaj ne rajtis ian pagon de la Ŝtato, krom tri monatoj en asbesto-cementa uzino, kontraŭ kiu eĉ la laboroficejo avertis min, kaj tri semajnoj en aeroplana uzino ĝuste antaŭ ol oni fine alvokis min.

Dum tiu ĉi periodo mi skribadis al Bill ĝis liaj respondoj ĉesis. Alia amiko avertis min ke li mem fine demandis "Ĉu vi frakasis vian pojnnon?" ankoraŭ sen respondo. Mi intencis ke li tamen iam legos kion mi skribis; do mi simple aldonadis al la sama letero ĝis ĝi atingis 13 paĝojn, kiam mi ĉesis skribi, sed ankoraŭ tenadis kion mi jam skribis.

Post la milito, en 1946, mi provizore hejmis, kaj iris viziti mian onklinon en Cambuslang. Ŝi ne estis ĉehejme, sed la pordo, kiel kutime, ne estis ŝlosita; do mi malfermis ĝin kaj eniris. Dum mi sidis, atendante, mi aŭdis la klapon de la leterospaco leviĝi, kaj tuj poste la falon de letero. Mi iris por alpreni ĝin, sed je mia granda surprizo, ĝi adresiĝis al mi, kaj kiam mi malfermis ĝin – jes, kredo aŭ ne, tio ĉi estis la lasta mia adreso kiun li memoris: do li sendis, esperante ke ĝi iele/iame trovos min.

Nia korespondado daŭris dum iom da tempo; poste estis denova silento, sed subite li skribis por sciigi ke li venos hejmen. Ni renkontiĝis en Queen Street stacidomo, kaj baldaŭ poste estis en la du esperantaj societoj de Glasgovo.

Dume, ion pri miaj verkojn: en 1954 mi legis recenzon pri biografio pri Lloyd George, kiu aludis al la optimismaj pretendoj de Haig, antaŭ la realeco de Paschendaele – la recenzo eĉ citis la "On Passing the New Menin Gate" de Sassoon. Estis neeble komuniki la efekton de tio ĉe mi, intermilita infano, kies mondon ombrumis la nepriskribebbla hororo de La Granda Milito, kiu tamen certigos la finon de militado. Kaj nun, post jaroj dum ĝi forgesiĝis sub artikoloj kaj rakontoj kaj filmoj pri la 2aMM, jen ĝi denove. Mi havis la koncepton de grandioza romano kies temo traktiĝos kiel la enhavo de granda fermita kaldrono, kaj mi nebule projektis tute novan metodon de prezento, kaj eĉ iomete eksperimentis, sed Bill sciigis Regulon, kaj Regulo skribis al mi kuraĝigante ekfaron, kaj, ĉar mi sopiris eldonon, mi stulte komencis antaŭ ol mi estis preta. Kiam mi studadis por licenciĝi mi tamen daŭre iom verkis super ĝi, ĉar mi timis ke se mi permesos al ĝi fariĝi malvarma, mi neniam rekomencos. Mi jam priskribis kiel mi plugadis plu kiam mi rekomencis labori, kvankam ĝi preskaŭ neniigis socian vivon. Mi liberiĝis de ĝi en 1964, sed nun trovas ke neblas eldoni ĝin.

Ankaŭ dum mia studado, mi komencis traduki Rikardon IIIan, kaj la tradukado ankaŭ daŭris post kiam mi ĉesis studadi, sed ĉe ĝi la longa superlaborado estis tute senurĝa – mi reiris al ĝi kiam mi

sentis inklinon, kaj fakte mi povas trovi ĝin en la dramokolekto kiun mi utiligis, ĉar la ruĝaj paĝaj eĝoj estas grize blankaj ĝis tiu punkto pro kuŝado malferma en la suno dum jaroj ...

Mi komencis projekton kiun mi kovadis de kiam mi esti novica Esperantisto – rakonton por legemaj infanoj, kaj mi scias ke mi komencis ĝin antaŭ ol mi iris al Orkadio en 1974, ĉar kiam oni sendis de tie detalojn i.a. pri miaj novaj kolegoj, mi rimarkis ke la subestro estas iu s-ro Blance, kaj mi jam nomis mian kavaliron Blanc, kvankam mi neniam vidis, nek aŭdis, la nomon. Do la koincido nature trafis.

Dum la dek jaroj inter la finverko de LGK kaj mia transmigro al Orkadio mi deĵoris en du Glasgovaj lernejoj – Govan High kaj Queen's Park – provis sensukcese eldonigi anglan version de LGK kaj edziĝis en 1971.

En Orkadio nia konstruigo de domo alportis jarojlongan inkubon pro la agoj de malica loka aŭtoritato, de konstruanto kiu evitadis finkonstruon malgraŭ nia bankŝuldo kaj de provizantoj de la konstrumaterialo, kiuj, laŭ homo de ilia baza regiono kiun ni poste renkontis estis tutsimple krimuloj. Meze de nia turmentoj mi ricevis leteron de Torben Kehlet pri eldono de LGK. Mi respondis ke mi faris pli mallongan rakonton el ĝi en la angla kiun mi esperas eldonigi (fakte vera) kaj ne volis kompromiti kopirajton se mi sukcesos. Li reskribis por aserti ke tio ne estos problemo, kaj persistis ĝis mi fine diris ke li faru laŭvole. Do mi fine ricevis miajn aŭtorajn kopiojn de La Granda Kaldrono kiam mi jam tute indiferentis pri ĝi.

Tamen ĝi havis unu vere kontentigan, eĉ ekscitan, rezultaton por mi: mi ricevis tre afablan leteron de Hilda Dresen pri ĝi – ŝi eĉ enmetis parton de korespondado kiun ŝi havis kun angla soldato dum la 1aMM – kaj tio grandparte pravigis la horojn de laboro super ĝi kiujn mi tiom domaĝis, ĉar ŝi estis renoma personaĵo de miaj plej fruaj tagoj kiel Esperantisto.

Kiam la domkonstruaj krizoj iom modifiĝis, kaj kun TK kiel eldonisto, mi kuraĝiĝis verki novan romanon (sciencfikcian) [Red: Misio sen Alveno] kiun li ja senhezite eldonis, kaj tio kuraĝigis min fini, kaj proponi por eldono, mian porinfanan libron [Red: La Kastelo de Vitro], kiu fakte progresis ĝis la presprovaĵoj, sed ne plu – ĝis 2004. Dume, dank' al la interveno de eldonejo Kardo, mia Rikardo IIIa traduko aperis.

En 1986 ni revenis al Glangovo. Mi provis lokigi la lokan grupon, sed ne sukcesis, kaj aliaj aferoj intervenis, ĝis Marjorie Boulton sciigis min ke mi devas renkontiĝi kun David Kelso, kaj tiu sciigis ankoraŭ du aferojn kiujn mi devos: akompani lin al la loka grupo kaj verki artikolon por Esperanto en Skotlando.

Rat-Viro far Hju Rid

LABORATORIA Taglibro: PTPI-0001: Projekto Transmenso, Fazo I (a)

FORMATO: Travivaĵaj Noto(j)

LOKO: Soft-Ĉambraro A1, Soft-seĝo A1

LIGO, Homa: Neŭroŝtopila tra Soft-seĝa daten-tunelo; Besta: Neŭro-enplantaĵo tra Bluetooth

DATO: 16a de junio 2043

HORO: 10d 73c. DAŬRO: 5 centonoj

LIGITA Teknikisto: Jon Grossan

ARKIVO: Rekta fluo al DatenArkivo TM000572:12

OBSERVAJ Teknikistoj: A. Nisbet, C. Crow, N. Shields [AN20084; CC20073; NS20054]

LIGITA Besto: Rato: SD200AC: Kovo CA60: Genotipo SD-A43-Serio-T.

Tiuj ĉi estas la travivaĵaj notoj de la unua rata-al-homa konscio-ligo tra neŭroŝtopilo-al-analoga ordinato, okazigita la posttagmezon de la 16a de junio 2043. La subjekto estas Jon Grossan, kiu raportas pri sia travivaĵo de unu-direkta daten-tunela ligo je mikro-ŝtopilita subjekto de ratraso Sprague Dawley, SD200AC.

Ha! Rigardu min! Tuj en scientistan manieron jam! Mi sciis ke tiu ĉi okazos. Vidu: mi pensis ke mi solvis ĝin per tio ke mi pensu pri leganto ekde la komenco. Sed malnovaj kutimoj mortas malfacile!

Do, jen, *travivaĵa* noto, unua persona raporto pri tio, kiel estas eni en la menso de rato. Mi povas dependi de miaj aliaj teamanoj por la teknikaj materialoj. Tri sendependaj sciencistoj faris proprajn registrojn kaj la tutan ligodaŭron oni registris kaj konservis en datenarkivon. La venonta volontulo kiu ricevos neŭroŝtopilon povos rekte travivi mian sperton per neŭro-tunelo. Sed ĝis tiam, estas mia tasko registri la eventojn de mia persona vidpunkto.

Ĝi devas esti subjektiva. Tio ĉi estas eksperimento pri subjektiveco mem; la tuta celo de Programo Konscio. Kaj jen denove, rigardu min! Mi diskutas la celon de la programo anstataŭ priskribi tion kio okazis. Damne! Mi kalkulis ke, se mi bildigis al mi alparolaton, estus pli facile. Honeste dirite, mi opinias ke estos plej facile imagi ke mi parolos al vi homoj – Doktorojn Nisbet, Crow kaj Shields! – ke mi babilas al miaj amikoj – alimaniere mia sciencista instinkto, mia emocii fronte al la tioma ĝis-intesta evento detruos la celon de tiu ĉi raporto. Mi falos en defaŭltan lingvon, pasivan voĉon kaj senpersonajn dirojn – la plej bazaj iloj de la senemocia observanto antaŭ konfuzo de datena kalajdeskopo.

Okej. Ĉi-foje!

Homoj, estis mirinde. Kia nekredeble vojaĝo, tute malsimila ol ligo al simulframo. Unue tion mi rimarkis; la momenton de ligiĝo. Mi konas la neŭroŝtopilan skuon, la momenton kiam aktiviĝas la interfacoj kaj la sensaro skuvibras. Mi ne scias kiom da fojoj mi petis al Simtech ordigi tion ĉi. Sed

la bio-klinko estas alia sento. Ĝi estas glita kaj glata. Unu momenton mi sidas en la soft-seĝo, la sekvan mi trovas min en la kaĝo. Unu momenton mi vivas en la homa mondo, apenaŭ rimarkanta korpajn sentojn. Mi estis nervoza, mi estis ekscitita. La sekvan momenton mi flosas en la rata sensaro, plene enmergita ĝis la intesto.

Kaj jam en la korpo de SD200, ĉio iras tre rapide. Ĉiu sento flugas. Visceraj sentoj trainundas, kaj malaperas, kaj tiam, neosekundojn poste, tiuj revenas kaj okupas la tutan menson.

Vide, aspektas kiel oni imagus. Ni muntis kameraetojn sur ratoj dum jaroj kaj sekvis ilin tra kaĝoj kaj labirintoj. Jen kiel aspektas. La skalo, la perspektivo, estas pli-malpli kion ni atendis. La diferenco kuŝas la proporcia miso. Mi ne povas elpensi pli bona priskribon: lia du-dimensia preskaŭ-360° panoramo enpremita en fronto-rigardan stereoskopian vidon. Ni devas devigi la analog-teknulojn fari ion pri tio. La tuta sceno estas kunpremegita, kiel larĝa ekrano ŝrumpigita en 4:3-on.

Kaj ne havi kapablon turni la okulojn! Mi fiksrigardas en ĉiujn direktojn, enprenanta la tutan panoramon. Subite la atento tiriĝas al io en la vida kampo, al io kion SD200 volas rigardi. Sed, homoj, videblas eta tranĉo de 3D rekte en la mezo, kiel mallarĝa kolumno de stereo flosanta antaŭ plato.

Ho, kaj ne frapu la kaĝon, homoj. Tio kaŭzas inferan ŝokon al mi.

La kaĝo malgrandas kaj SD200 sentas sin enkarcerita. Libero estas en liaj ostoj. Ke li nur trovu vojon tra la dratoj de la kradpordo. Li volas ronĝi. Miaj dentoj doloras nun je la penso; forskrapi, iom post iom; senti la dratojn pecetiĝi eto post eto – mordi, mordi, ronĝi, mordi. Ho! Estus bone! Sed troviĝas en la dratoj nenia cedo, kaj kiom mi provis. Pardonu min. Kiom provis SD200. Li kunpremis la dentojn ĝis ili preskaŭ frakasus. Nur por esti libera.

Tra la kradpordo videblas la plej facila eliro. Ekzistas spaco ekstere. Sed ne estas sekure; tro senkovrite; sed li ne sentas sin sekura ĉi tie: la tegmento estas travidebla, li sentas sin nuda. Se li nur povus trapasi la kraddratojn, mi povus supren grimpi – nu, SD200 – aŭ povus salti al la planko por trovi ie angulon aŭ truon.

La ekscrecio perturbas min. Jen mia homa reago, kompreneble. SD200 sentas nenian honton. Por li, pure plezuras. Sed ial li deziras iri al nur unu angulo por feki.

Iu trejnis lin. La virino. Mi povas vidis ŝian vizaĝon. Unu el la asistantoj. Ŝi estas grandega. Ne. Jen mia rata perspektivo. Ŝi havas harvoston. Ha! Ŝi estas Oonagh! La plej juna. Estas ŝi! Ŝi instruas al li lertaĵojn per rekompenco de manĝaĵeto. Ho homo, mi ĵus spertis memoron en kiu mi piruetis por ŝi. Tiom da lernado por nur peco de frukto. Vinbero! Homo, tiom da cerbumado, da rigardado, da saltado, da dancado nur por eltrovi kion ŝi infere volas de mi por unu vinbero. Mi scivolas kiun alian ŝi trejnis. Ŝi ne devis; tio kontraŭas la regulojn. Ho, atendu, moment' . . . kiaj estas iliaj homaj nomoj? Jes, SD219 kaj SD198. Jen ili. Ni estis kune en la antaŭ-selekta kaĝo. Jen ili. Ambaŭ piruetus por vinbero. Provu, homoj. Klaku la langon, tenu vinberon super iliaj kapoj. Kaj poste demandu al Oonagh. Kia brila konfirmo tio estus!

Oonagh odoras bele. Ŝi reprezentas ĝuon kaj komforton. Ŝi estas sekura. Mi povus volvi min sur

ŝi. Ho. Ŭaŭ! Mirinde! Mi sciis tion per miaj vibrisoj. Mi sensis ke ŝi estas sekura per miaj vibrisoj! Jen enigmo pro la sensuma teamo. Ni uzas vibrisojn por detekti danĝeron. Kiel tiel, do?

Mi amas Oonagh. Ŝi estas mia plej ŝatata homo. Mi ne ŝatas vin, homoj. Merde, mi ne ŝatas min. Ni estas danĝeraj. Ni ne estas prognozeblaj. Ni uzas nadlojn. Ni levas per la vosto.

Ho, Dio, kiel mi solecas. Mi volas kunpremiĝi kun alia rato. Ili proksimas. Mi povas flari ilin, mi povas aŭdi ilin moviĝi. Mi volas vidi alian raton.

Ho! Bizare; mi parolas kvazaŭ li. Mi volas diri tiel, ke SD200 deziras vidi alian raton.

Mi lacas nun, homoj. Pseŭdo-cerboskuo venas. Pli frue ol mi atendis.

Jen la fino de travivaĵa raporto 1.

LABORATORIA Taglibro: PTPI-0001: Projekto Transmenso, Fazo I (b)

FORMATO: Travivaĵaj Noto(j)

LOKO: Soft-Ĉambraro A1, Soft-seĝo A1

LIGO, Homa: Neŭroŝtopila tra Soft-seĝa daten-tunelo; Besta: Neŭro-enplantaĵo tra Bluetooth

DATO: 17a de junio 2043

HORO: 9d 62c. DAŬRO: 6 centonoj

LIGITA Teknikisto: Jon Grossan

ARKIVO: Rekta fluo al DatenArkivo TM000572:13

OBSERVAJ Teknikistoj: A. Nisbet, C. Crow, N. Shields [AN20084; CC20073; NS20054]

LIGITA Besto: Rato: SD200AC: Kovo CA60: Genotipo SD-A43-Serio-T.

Ŭaŭ! Estas bonege vidi la aliajn ratojn denove. Mankis al mi esti kun ili.

Estis streĉe en la komenco. Mi kredas ke okazis potencoŝanĝo. SD198 dominas nun. Regis antaŭe tiu ulo, kio damne estas lia homa nomo? Li havas nigran voston, kaj la okuloj klinas iomete suben. SD219 ne plu rolas, rangas tre sube en alia strukturo. Strange ke ni tri estis en antaŭ-selekto kune. Ni uzas malĝustajn kriteriojn por selekto. Momenton – jes, ni *homoj* uzas malĝustajn kriteriojn!

Estas hezito. Mi volas kuni kun ili sed ili ĉiuj estas singardaj. Mi venis tra la tunelo kaj ili ĉiuj disiĝis en la angulojn de la ĉambro, poste retren rigardis al mi. SD198 snufas, levas la muzelon. Mi snufas ankaŭ, kaj etendigas la vibrisojn. Tio ne havas sencon; vibrisoj ne etendiĝas. Ili kreskas ĝis difinitiva longo. Jen ĉio. Ĉi tie, tamen, en la menso de SD200, sentiĝas ke mi etendigas ilin, kiel oni etendigas manojn antaŭ si kiam oni trairas malhelan ĉambron.

Mi rekonas ĉies odorojn en kelkaj neosekundoj. Mi scias kiuj ili estas. Antaŭe mi snufis kaj volviĝis proksime kun ĉiu el ili. Ili ankoraŭ singardas; poste la odoro ŝanĝiĝas. SD198 unue, post li la aliaj sekvas. Mi ne povas vortskribi ĝin, homoj. Ni ne posedas terminojn por flaraj fonemoj. Mi povas diri nur ke mi konis ĉiun individuon en la odoraro. Ĉiu diris "mi singardas". Tiam, unu post la alia, kiel domenaro, la odoroj diris "mi konas lin."

Mi rampis al SD198, levante mian nazon ripete, kontrolante ĉu lia odoro ŝanĝiĝos. Fari tion sentis al mi bone. La spasmetado de mia kolaj muskoloj kaj la ensnufado de aero. En ĉiu flaro estas centoj da odoroj, ĉiuj moviĝas, altiĝantaj kaj falantaj, informantaj al mi mian situacion.

Li vibrisoj certigas min ke nenia danĝero estas. La odoroj deklaras ke mi mankis al ili. Kaj, jen, mi situas inter ili. Kia sento! Naz-al-voste, harar-al-harare, la korpovarmo kaj la kartavado de iliaj korobatoj. La feliĉa ekzaltiĝo kaj sekuro de la nesto. Hejmo, hejmo, hejmo.

Ni devas ŝanĝi nian traktan politikon, homoj, post tio ĉi. Mi sentis kion travivas tiuj ĉi kompatindaj bestoj, momenton post momento. Ĉiu emocio traflugas, intensa kaj tuta. Feliĉo, timo, ekzalto kaj ĝojo. Ni devas pli bone konduki, homoj, multe pli bone.

Kaj mi lacas denove. Pseŭdo estas megero. Se estos kiel hieraŭ, mi baldaŭ dormos dum horoj. Poste, ĉi-vespere, okazos pli da cerbo-biaj testoj kaj neŭro-ŝtopilaj integro-testoj. Mi eble spektos filmon, se mi povos resti veka.

Do, morgaŭ estos la granda tago por SD200. Li bonŝancos!

Tio ĉi estos bizara. Mi ekscitas, efektive. Ho! Tio ŝajnis al mi kiel konfeso. Mi estas iom tima. La penso de kopuli kun ina muroideo estas iomete, nu, perturba. Mi scias tion, ĉar mi volontulis. Mi trapasis psiko-babiladon kaj psiko-testojn. Mi akceptis la defion. Sed la mapado de rata cerbo al homa pligrandigas ĉion. Mi sciis ke la sperto estos engluta. Kaj tiel ja estis. La sensoj de SD200 inundas min. Estas kiel plonĝi en basenon da malvarma gasa akvo; pika kaj mola samtempe. Kaj tio ĉi estas nur lia ĉiutaga sensaro.

Do, se seksumo estas por ni homoj tioma inundo de plezuro, tiom superŝuta, kion faros la sensara pligrandigo?

Okej, sufiĉe. Mi enlitiĝos. Fino de travivaĵa raporto 2.

LABORATORIA Taglibro: PTPI-0001: Projekto Transmenso, Fazo I (c)

FORMATO: Travivaĵaj Noto(j)

LOKO: Soft-Ĉambraro A1, Soft-seĝo A1

LIGO, Homa: Neŭroŝtopila tra Soft-seĝa daten-tunelo; Besta: Neŭro-enplantaĵo tra Bluetooth

DATO: 18a de junio 2043

HORO: 9d 55c. DAŬRO: 7 centonoj

LIGITA Teknikisto: Jon Grossan

ARKIVO: Rekta fluo al DatenArkivo TM000572:13

OBSERVAJ Teknikistoj: A. Nisbet, C. Crow, N. Shields [AN20084; CC20073; NS20054]

LIGITA Besto: Rato: SD200AC: Kovo CA60: Genotipo SD-A43-Serio-T.

La unua afero kiun mi rimarkis estis la odoro. Mi neniam antaŭe vidis inan raton. Tio estas mi, Jon Grossan, neniam vidis tra la okuloj de rato, kaj mi, SD200, neniam *ajn* vidis inon. Ŝi estas malpli granda ol mi kaj pli svelta, kiel unu el la junuloj en la hejma kaĝo. Sed rimarkeblas la odoro

kiun ŝi kunportas. Ĝi ŝanĝas ĉion. La kaĝo ŝajnas malpli peza. Videblas brilo sur la segaĵo. La tegmento estas travidebla kaj ni sentas nin minace malkovritaj sub la lumo, sed la minaco malkreskis. Ŝi trankviligis min!

Kiam mi nazŝovas en ŝian direkton, etendante la vibrisojn, spasmigante la kolajn muskolojn kaj aŭskultante la odoro-mesaĝojn, mi ne sentas streĉitecon. Nenia penso pri batalo. Ŝi faras same: etendas la vibrisojn, snufas. Mi rampas kelkajn paŝojn antaŭe; ŝia odoro fortiĝas. Ĝi flariĝas dolĉe kaj memorigis min pri io. Momenton; kamomilo. Ŝi odoras kiel kamomilo kaj mi deziras esti apud ŝi.

Niaj nazoj kuntuŝas. Mi sentas tion malsame ol nazumon de alia rato, eĉ juna. La odoro estas tiel alloga kaj ŝia nazo cedas pli volonte kiam mi premas. Mi sentas eksciton kaj cedemon en la ŝultroj. Mi ŝoviĝas preter ŝi kaj miaj vibrisoj risortas. Mi atingas ŝian voston. Ŝi estas tiel mallonga. Ŝia kapo atingas apenaŭ preter mia ventro. Mi levas la kapon kaj snufflaras ŝian dorson, la parton super ŝia vosto. Ho. Kamomilo kaj tre mola mosko.

Ŝia hararo estas mola.

Ŝi rampas kelkajn paŝojn kaj mi nazumas al la diko de ŝia vosto. Mi snufas sube. Ho! Ne estas poŝo – tio ĉi surprizo estas de SD200; mi, Jon Crossan, scias ke ŝi ne posedas testikojn, sed li neniam vidis inon – lia koro kartavas. La sento estas entute bela; kiel la unuan fojon kiam oni akompanas hejmen de la lernejo la knabinon kiun oni admiras. Nenia sento de privilegio nek fiero. Nur la simpla ĝuo esti ĉe ŝia flanko.

Danme! La klako kiam malfermiĝas la tegmento. Mi ekas al angulo kaj anhelas, rigardas malantaŭen. Ŝi turnas sin sur punkto kaj rigardas supren. Kio okazas, homoj? Ĉu ni planis tion ĉi? La tegmento leviĝas. La odoro de la ĉambro trabalaiĝas kaj ŝia odoro malaperas. Mano envenas. Ĝi levas ŝin kaj ŝi malaperas. La tegmento fermiĝas kun klako.

Mi sentas perdon. Mi ĝuis tion ĉi. Mi deziris ke ŝia ĉeesto daŭru. Sed SD200 sentas enordon. Li pluiris al la sekva sento, trankviliĝinte post la klako. Kaj restas nun simpla soleco.

Mi pensas, homoj, ke mi pli bone distingas liajn sentojn de la miaj.

Merde! La klako denove. Kia feka ŝoko. Ne akceptindas, homoj, ni devas uzi silentan klinko iapsecan.

Kio nun? La tegmento malfermiĝas. Mano envenas tenanta pluan raton. Ino. La mano detiras sin kaj la tegmento fermiĝas. Ho Dio, la odoro! Homo! Tiu ĉi estas en oestro! Ŝi turnas sin, snufas kaj poste ekkuras miadirekten. Mi koro kartavas kaj mi anhelas.

Ŝi haltas kaj rondkuras surloke. Mi rigardas kun fascino. Ŝiaj oreloj vibras. Ŝi turnas sin for de mi kaj levas la voston. Ŝia aperturo estas plene aperta. Sento de varmego trafluas min. Mi ekkuras al ŝi kaj lekas. Mi aŭdas ŝin pepi. Mi snufflaras ŝian dorson kaj rampas sur ŝin. Mi ektenas ŝian nukon per miaj dentoj kaj tiras. Mi eniras – ho – kaj finiĝas. Jen. Fino. Ŝi formoviĝas kaj – Ne! Mi lekas mian membron – forpurigante la fluidaĵojn. Ili gustumas tiel, ho ne – bonaj! Kiel terure!

La tegmento malfermiĝas kaj mano levas ŝin for. Ŝia odoro malaperas. SD200 staras sur

malantaŭaj piedoj, nazumanta la aeron serĉanta ŝian odoron. Ĝi ne kapteblas, kaj li iras manĝi.

Fino de travivaĵa raporto 3.

LABORATORIA Taglibro: PTPI-0001: Projekto Transmenso, Fazo II (a)

FORMATO: Soft-Ĉambra(j) Noto(j)

LOKO: Soft-Ĉambraro A1

DATO: 19a de junio 2043

HORO: 8d 13c.

TEKNIKISTO: Jon Grossan

ARKIVO: NA

OBSERVAJ Teknikistoj: NA

LIGITA Besto: NA

Hodiaŭ estas la unua tago de refortiĝo, kaj mi ankoraŭ zumas. Homoj, mi dankegas ke ĉiu ligiĝo daŭris nur kelkajn centadojn. Ni planis tion bone. Pli longa estus malfacile tolerebla; ne tiom je tagoj 1 kaj 2, sed hieraŭ estis fortege. Post elŝtopiĝo, mi tuj eniris pseŭdon kaj dormis dum kvin dekadaj. Kiam mi vekigis fruvespere mi ankoraŭ nubis mense, iomete senorientiĝa kaj spertanta retrovidojn de la mateno.

Jen punkto grava: temopodaŭro. Vi memoras kiel, kiam infano, jaro ŝajnas eterno? Nu, la sep centadoj de hieraŭ ŝajnis kiel tuta mateno. Kaj kiam mi rememoras ian detalon de la unuaj du tagoj – la snufon de ies vizaĝo aŭ la aŭdon de ties korkartavo – mi konscias ke ĝi daŭris nur neosekundojn, sed mi sentas ĝin esti multe pli longa. Ĉu mi ricevas ratajn kvaliojn, perspektivon de rato pri sia vivodaŭro? Aŭ, ĉu temas pri la pligrandiga efiko sur tempon? Se jes, tio estas neatendita. La tunelon oni ne dratumis tiel. Oni petu la ulojn en Percepteco pri tio.

Mi dormis bone. Sen sonĝoj, kaj hodiaŭ, kiel mi diris, mi zumas. La paŭzo estas bona, tamen. Kiu ajn neŭroŝtopilas en la arkivojn komprenos. Mi provis priskribi kiel estis per homaj terminoj, laŭ mia kapablo. La teorio asertas ke la datena fluo povas eksciti la sensajn kvaliojn kiun kapablas mia cerbo. Tiel asertas la teorio. Se ĝi veras, kuŝas do latentaj multo en la grizaj ĉelĉoj kiun ni neniam sentas. Aliflanke, mi perceptis ratajn sensojn; aferojn kiujn nur rato sentas. Tiu piko, tiu gusto, la parto intera, la patino kuŝanta sub la supra koloro. Ekzistis io plia, homoj, io pli ol mi.

Sed kiel mi povas distingi? La fluo-al-kvalia mapado okazonta venontan semajnon sendube disfibros ĉion ĉi, kaj ni lernos ion pli definitivan.

Mankas al mi la etaj uloj. Iliaj etaj vizaĝoj, iliaj etaj nazoj, kaj iliaj grandegaj vibrisoj.

Okej, homoj, estas planita por mi psikobabilo kun Matthews post dek. Sekve de tio, neŭroŝtopila tralavo la tutan posttagmezon. Tio stultigos min, sendube. Pseŭdo estis pli peza ol mi atendis. Mi dormis hieraŭ ĝis mezmateno.

Fino de soft-ĉambra noto 1.

LABORATORIA Taglibro: PTPI-0001: Projekto Transmenso, Fazo II (b)

FORMATO: Soft-Ĉambra(j) Noto(j)

DATO: 20a de junio 2043

TEKNIKISTO: mi

Mi ne emas movi la postajon, vere. Mi antaŭĝuis eniron kiam mi vekiĝis ĉi-matene, poste mi memoris ke ni jam faris ĉiujn. Ili fariĝas foran memoron nun, kiel ferio kelkajn tagojn post hejmrveno. Mi ne atendis tion ĉi. Ne por tio mi volontulis. Mi sciis ke ĝi estos mirinda vojaĝo, kaj iomete bizara. Tio allogis min, mi supozas. Ne nur la neŭroŝtopila enplanto. Ekzistas nun, kiom da, dek entute jam, sed ĉiuj estas simul-ligoj. Allogis la penso de ligo al vivanta aĵo, por malkovri kiel sentiĝas iri kvarpiede, malvarmiĝi per la vosto anstataŭ ŝviti, aŭdi pli bone ol vidi. Mi sciis ke estos bonege, sed ne tiom damne bonege. Esti rato ne adekvatas, ĉu ne, se vi povas anstataŭe esti homa, je la pinto de la evolua ĉeno? Nu, ja adekvatas, homoj. Adekvatas. Adekvatas same bone; same feke bone.

Jen, do; ne emas la postajon movi.

Fino de.

LABORATORIA Taglibro: PTPI-0001: Projekto Transmenso, Fazo II (c)

FORMATO: Soft-Ĉambra(j) Noto(j)

DATO: 21a de junio 2043

Hodiaŭ mi sentas min depremita. Eble ĉar enkaĝita en tiu ĉi ĉambraro dum kvin tagoj; sola kun nura kontakto per video-telefono. Ne povas esti tio, tamen. Mi restis ĉi tie pli longe dum la simul-liga trejno post enplanto. Ĝi estas spaco-plena, enhavas sufiĉajn ĉambrojn, kaj mi havas balkonon superrigardantan al parkaj kampoj. Ĉiam estis bele ĉi tie en la pasinteco. Mi ŝatas ĝin. Mi estas la unua okupanto, sekve ĝi estas kvazaŭ la mia. Mi komfortas.

Sed tio ne estas la juko. La izolo ne problemas. Kompreneble, mi volas vidi vin ĉiujn por paroli pri ĉio ĉi. Poste iri trinki bieron, eble. Ja, tio estus bona. Kaj certe helpus. Sed ne vi mankas al mi. Mankas la ligo. Mi deziras religiĝi. Mi deziras reesti en la kaĝo.

Ni ne anticipis tion ĉi, tute ne.

Mi nervozis pri la datena tunelo, kompreneble. Tamen, mi atendis ke mi ĝuos, kaj mi ja ĝuis. Sed ni ne anticipis perdosimptomojn.

Tiu ĉi doloro en mia koro. Tiu ĉi sopiro vidi ilin denove kaj reesti en la kaĝo. Mi volas senti ĝian formon, vidi ĝiajn montetojn de segaĵo. Mi volas grimpi kaj snufi kaj aŭdi la sonojn. Mi volas froti min kontraŭ la krado kaj mordi la klinkon de la pordo. Kaj pleje, kunplektiĝi kun miaj kunkovuloj kaj senti harojn kontraŭ haroj.

Fino de noto.

LABORATORIA Taglibro: PTPI-0001: Projekto Transmenso, Fazo II (d)

FORMATO: Soft-Ĉambra(j) Noto(j)

DATO: 22a de junio 2043

Ho Dio ne, ne temas pri miaj kunkovuloj. Mi pensis tiel, sed mi trovis min en malagnosko. Temas pri la knabina rato, estas ŝi, estas ŝi kiu mankas al mi. Mi ne povas forigi ŝin el miaj pensoj. Tiu ĉi doloro en mia koro estas por ŝi. Ŝi, la unua, tiu ne en oestro, kiun mi ne atendis, ŝi eniĝis en mian animon. Tiom, tiom. Mi paŝas tra la ĉambraro. Mi sidas kaj provas legi, sed mi ne povas atenti. Mi staras sur la balkono kaj fiksrigardas al la parko. Mi duonatendas vidi ŝin rapidi trans la herbejo de el la arboj. Sed tio estas freneza. Ŝi estas en kaĝo en Marshall Kampo, for je dek kilometroj. Kiel, infere, ŝi povus alveni ĉi tien? Kaj kial ŝi venus serĉanta min? Ŝi ne konas min. Ŝi pensas ke mi estas alia rato kun ŝveliĝo sur la kapo kie oni ensuturis la sendilon.

Kaj mi ne konas ŝin. Mi eĉ ne konas ŝian nomon. Ŝi havas etikedon sur la vosto kiel havas ĉiuj ratoj. Mi vidis ĝin tiam, kiam mi snufis ŝin kaj vidis ke ŝi ne havas poŝon. Sed mi ne pensis legi la numeron. Kial mi devus? Kiel mi sciis ke ŝi lasus min tiel?

Estas netolereble. Mi disŝiriĝas. Mi iradas al la ligoĉambro. Mi sidas en la Soft-seĝo kaj klinas min retren. Mi metas la kapon en tenan korbon. Mi atendas kontakton. Sed, kompreneble, nenio okazas. Nenio iam okazos. Mi klinis min antaŭen kaj mi flarsnufas la aeron. Mi spasmigas la kolon retren kaj snuf-snufas, esperanta flari odoron de ŝi. Mi lekas la manojn. Sed mi trovas nenion, absolute nenion.

Mi sentas nur tiun ĉi doloron en mia brusto, sopiranta ŝin, nur ŝin.

Ho Dio, doloras tiom. Kial doloras tiom?

Fino de Soft-Ĉambrara noto. Ame, Jon.

ALDONAĴO: 14a de januaro 2045: C Crow [CC20073]

Teknikisto Grossan translaboriĝis al Simul-Ligo, tri monatojn post la seninstrukciiĝo de la Soft-Ĉambraro, kie li enposteniĝis pri neŭroŝtopila aŭtentikeco. Post peto al la universitata komitato pri etika esploro, oni permesis lin teni SD402AF en lia hejmo ĝis ŝi forpasis pro maljunaĝo jaron poste. Li ricevis vidviĝan konsilon sekve de ŝia morto kaj reiris al laboro post ses semajnoj, eble pli frue ol estus konsilinde.

Mia Patro, John Logie Baird



Mia Patro, John Logie Baird, naskiĝis dum la jaro 1888, en la *Lodge*, 121 Argyle Strato, Helensburgh. Li estis la dua filo de la pastro de la pastro de la preĝejo de Sankta Bride. Li kreskiĝis en granda sed iomete malkomforta Viktoriana domo, grandparte nevarmigita. Tamen, ĝi havis la plej grandan manĝoĉambbron en Helensburgh. Mia avo havis kvar infanojn (du filojn kaj du filinojn), kaj li konstruis ŝtuparon kaj tri novajn ĉambrojn. La plej grava estis la kabineto, kiu havis sufiĉe bonan bibliotekon. Tamen la tuta domo estis malvarma, kaj dum li estis knabo, mia patro ofte malvarmumis kaj devis resti hejme. Tamen li ne estis mallaborema; fakte, li estis tre inventema.

Unue li faris telefonsistemon por ke li povus komuniki kun siaj amikoj, kiuj loĝis proksime: li kuplis la domon per dratoj. Tamen ĉi tiu projekto finiĝis, ĉar fiakristo preskaŭ estis frapigita el sia sidejo per la drato tra la strato.

Li ankaŭ konstruis malgrandan flugmaŝinon. Li kaj lia amiko portis ĝin supren al la tegmento de la *Lodge* kaj mia patro eniris ĝin. Bedaŭrinde la amiko puŝis la flugmaŝinon kaj mia patro surteriĝis sur la gazono, feliĉe nevundita.

Li eniris la lernejon Larchfield en Helensburgh kaj poste li studis elektroteknikon en Anderson Kolegio en Glasgovo, kie li fine akiris diplomon. Kiam la unua mondmilito komenciĝis, li iris kun multaj aliaj studentoj por rekrutiĝi. Tamen, oni deklaris, ke li estas tro malsana por fariĝi soldato. Tamen li trovis okupon en la Clyde Valley elektrocentro apud Rutherglen. Li devis eliri, tage kaj nokte, por direkti la laboristojn kiuj riparitis neprefektaĵojn de la elektra sistemo, sed pro sia malsano li devis rezigni pri tiu okupo. Do li provis aliajn inventojn.

Lia unua invento estis la “Baird Undersock”, kiu estis designita por ke soldatoj ĉiam havu varmajn piedojn. Li uzis virinojn kun reklamtabuloj por reklami tiun projekton kaj grande sukcesis. Bedaŭrinde, li devis rezigni ĝin, ĉar li denove malsanis.

Do li decidis serĉi varman klimaton, kaj vojaĝis al Trinidado, ĉar la klimato estis pli varma tie. Li trovis abundajn kvantojn de frukto kaj sukero, kaj li decidis konstrui fabrikon por produkti

marmeladon. Bedaŭrinde la fabriko ne havis tegmenton: multaj insektoj falis en la miksaĵon, kaj oni ne povis vendi ĝin.

Li decidis reveni al Londono, sed tie la vetero ne taŭgis por li. Li estis tre malsana, kaj lia amiko proponis, ki ili iru al la maro, al Hastings, ĉe la angla markolo.

En la freŝa aero de Hastings li rapide resaniĝis, kaj povis iri promenadi. Iufoje li atingis al Fairlight Glen, kaj kiam li revenis, li informis sian amikon, ke li subite pensis pri la eblecoj de televido. En sia dormĉambro li kolektis materialojn kaj baldaŭ sukcesis dissendi kaj ricevi la silueton de malgranda kruco. Estis la unua televido.

Tamen liaj eksperimentoj kaŭzis problemojn en Hastings, kaj li decidis transloĝiĝi al Frith Strato en Londono. Finfine li sukcesis produkti efektivan televidon.

Estis la jaro 1925. Baldaŭ mia patro komencis elmontri la novan medion, unue en la oficejo en Frith Strato, kaj ankaŭ en la butikoj Selfridges. Kiam mi naskiĝis en la jaro 1932, li loĝis en domo sur Sydenham Monteto (konvena por dissendi televidon) kie li havis laboratorion en la remizo; fakte li atingis la plej altan pinton de sia kariero. Tamen poste, li devis lukti kontraŭ potencaj kompanioj kiuj ankaŭ uzis elektronikan televidon, kaj kiam la dua mondmilito komenciĝis, la registaro fermis la televidan sistemon. Mia patro restis en Londono kaj sukcesis pli produkti multajn inventojn pri televido. Mi memoras esti vidinta koloran televidon en la laboratorio: li uzis manekenojn – mi memoras “Popeye La Maristo”. Tamen, li sendis sian familion al Bude en Kornvalo por eviti la bombojn. Mi kaj mia frato estis tre feliĉaj en Bude, mara feriejo en Kornvalo, sed mi vidis mian patron nur dum semajnfinoj, kiam li estis tute lacigita pro la longa vojaĝo per trajno. Tamen mi ĝuis promeni laŭlonge de la marbordo, kie ni havis multajn vivecajn diskutojn.

En Londono li sukcesis produkti koloran televidon dum la jaro 1941, sed neniu efektive ricevis ĝin pro la malbona milito.

Post la milito, li decidis loĝi en Bexhill, kaj li komencis konstrui sistemon de televido en kinejoj. Tamen lia malsano venkis lin, kaj li mortis dum la jaro 1946.

Mi kaj mia frato Malcolm vojaĝis al Skotlando, kie mia onklino, Fraŭlino Annie Baird, kaj ŝia mastrumistino Margaret Scott prizorgis nin. La malnova Viktoriana domo, la *Lodge*, estis neŝanĝita de kiam mia patro loĝis tie. Mi trovis la bibliotekon de mia avo, kie mi legis multajn librojn; ĉi tio grande helpis min kiam mi studis en la universitato de Glasgovo. Mi loĝis en la *Lodge* de tempo al tempo inter la jaroj 1947 ĝis 1956, kiam mi edziniĝis. Mi havas multajn feliĉajn memorojn de mia vivo en la *Lodge*, kaj de mia patro, John Logie Baird.

Diana Richardson


Malantaŭ la kulisoj ĉe Duolingo





Duolingo <https://www.duolingo.com/> estas retejo, kiu proponas senpagajn kursojn pri diversaj lingvoj, kaj fine de majo 2015 lanĉiĝis la kurso de Esperanto por anglalingvanoj ĉe Duolingo, post 9 monatoj de laboro de teamo de Esperanto-parolantoj, teamo al kiu mi aliĝis por la lastaj 3 monatoj antaŭ la lanĉo. En la nuna momento kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn, Duolingo ofertas kursojn pri 44 lingvokombinoj, kaj 20 pluaj kursoj evoluigatas. La plej populara kurso estas la angla por hispanaparolantoj kun preskaŭ 37 milionoj da lernantoj, kaj en dua loko la hispana por anglaparolantoj kun pli ol 34 milionoj da lernantoj.

Nia kurso de Esperanto akiris pli ol 10000 lernantojn dum la unuaj 24 horoj post la lanĉiĝo. Dum mi skribas, ĝi jam atingis pli ol 27000, kaj eĉ fariĝis pli populara ol la kurso de la ukraina lingvo por anglalingvanoj, kurso kiu lanĉiĝis antaŭ la nia, kaj ni rapide alproksimiĝas al la sumo de lernantoj de la kurso de norvega por anglalingvanoj, ankaŭ lanĉita ĵus antaŭ ol nia. Notinde estas mencii la kurson pri la irlanda lingvo kiu atingis signifan sukceson alloginte ĝis nun 700000 novajn lernantojn al tiu lingvo. Eble estus ambicie imagi ke la Esperanto-kurso atingos eĉ duonon de tiu sukceso, sed ni aldonas ĉiun tagon plurcent novajn lernantojn al niaj ciferoj, do kiu scias post pliaj du-tri jaroj?






La evoluigteamo por Duolingo-Esperanto por anglalingvanoj



Tipaj demandoj en la kurso

La strukturo de la kurso konsistas el *arbo de lertoj*, kiujn la lernanto devas sekvi, ne rajtante moviĝi al la sekvanta, ĝis ŝli sukcesis pri la antaŭaj. Sukcese finita leciono fariĝas orkolora cirklo, sed post iom da tempo, tiu cirklo perdas la oran koloron, kaj fariĝis denove ora, se la lernanto denove praktikas tiun lecionon, por ne forgesi la jam lernitaĵojn. Laŭgrade, la lernanto sukcesas grimpi la arbon al pli kaj pli postulemaj lecionoj, kaj ĉe la fino de la kurso atingis eble nivelon inter B1 kaj B2 de la sistemo KER (Komuna Eŭropa Referenckadro).

La lecionoj mem konsistas el demandoj pri traduko en unu direkto aŭ la alia, aŭ pri elekto de la ĝusta mankanta vorto, aŭ pri kiu bildo korespondas al certa vorto, ktp. En la kazo de la demandoj pri tradukado, la evoluigintoj de la kurso devis listigi ĉiujn eblajn ĝustajn respondojn, kaj depende de la frazo, kelkfoje tio ne estas facila afero. Do, kio okazas, se estas eraro en la kurso, tio estas, ke lernanto donas ĝustan respondon, kiu ne estas sur la listo?




Kio se estas eraro en la kurso?

En la ekzemplo ĉi tie, oni petas de la lernanto tradukon en la anglan de la esperanta esprimo **Bonan apetiton!** Laŭ la kurso, inter la ĝustaj respondoj estas **Have a good meal!** kaj **Good appetite!** sed ne la respondo de ĉi tiu lernanto, **Have a nice meal**, kiu certe meritas akcepton. Kion fari? Unue, la lernanto devas plendi. Sub la anonco pri eraro, estas du butonoj, aŭ por sciigi al la kursteamo pri eraro, aŭ por diskuti la frazon kun la teamo kaj aliaj lernantoj.

Ĉiu kurso en Duolingo havas 3 fazojn: a) la evoluiga fazo, kiam la kursteamo evoluigas la enhavon de la kurso, kaj decidas kiujn vortojn kaj gramatikajn konceptojn instrui en kiu sinsekvo, kiajn klarigojn fari pri la gramatiko kaj la cetera fono de la lingvo, registri la sondosierojn, elekti la bildojn, ktp. b) la beta-fazo, aŭ testfazo, kiam la kurso estas lanĉita por publika uzo, sed atendente, ke estos problemetoj kiujn oni devos glatigi. Kompreneble, tuj post kiam kurso estas lanĉita, oni

atendas ke estos multaj malglataĵoj kaj diskutindaĵoj kiuj leviĝos. Plejparte, ili estos simple forgesitaj alternativoj, kiel en ĉi tiu ekzemplo, kaj se la kursteamo aldonas la mankantan respondon, la sama plendo ne okazos denove. c) Oni mezuras la kontentigecon de kurso per la nombro de plendoj pri eraroj. Kompreneble, ne ĉiu plendo estas ĝusta (ĉar la kurso povas ja pravi, kaj la lernanto malpravi!), kaj se la nivelo de plendo malpliigatas ĝis malpli ol 3% de la uzantoj dum iom da tempo, oni konsideras ke la kurso rajtas **diplomiĝi** el beta-versio ĝis plena finiteco. Tio estas, ke en la beta-versio, lernanto atendu ke estos problemoj pri la kurso, kaj post diplomiĝo ĝenerale ne estos tiaj problemoj. Tio estas la sama modelo kiun oni uzas por testi softvaron. Kompreneble, kurso, same kiel komputil-programo, neniam estas 100%-e finita, kaj oni povas daŭre aldoni korektojn.

Do, kion ni faris pri nia mankanta alternativo? Mi iris al la **Duolingo-Incubator** (kovilo) por trovi la koncernan frazon, kiu rilatas al la vorto **apetito**, kiu troviĝas en la unua leciono de la lerto pri **Manĝaĵo**. Tie mi vidas, ke 17% de lernantoj faras eraron kiam ili lernas tiun vorton, tio estas, ke ili iel malĝuste respondas. Specife jam estis sep plendoj pri tiu frazo, tio estas ses pri la traduko esperanta-anglen, kaj unu pri la inversa direkto. Mi do redaktis la permesatajn respondojn por permesi la mankantan frazon, kaj du aliajn. Post la ŝanĝo la koncerna frazo fariĝas verda, kaj kiam mi klakos sur la verda hoketo, la plendinto ricevos retmesaĝon por informi, ke ŝlia plendo estas akceptita. Restas nur la du ruĝaj plendoj, la svaga plendo pri 'malnatureco', kaj la libera formata, kaj la oranĝa misliterumita respondo. Pri tiu lasta, mi povas aŭ akcepti aŭ malakcepti ĝin en ĉi tiu okazo, aŭ verki mesaĝon por malakcepti ĝin se ĝi aperos estontece.



Korekti erarojn en la kovilo

Ni esperas post kelkaj monatoj forigi la plimulton de la aliaj malglataĵoj en la kurso kaj diplomiĝi el la test-fazo. Eĉ nun ni povas taksi la kurson granda sukceso, allogante amason de novaj homoj al Esperanto. Duolingo estas subteninda kaj laŭdinda afero, kiu subtenas lingvolernadon pri ĝis nun 64 kursoj jam pretaj aŭ en preparfazo.

Ĉio, kio antaŭenigas interkomprenon estas subteninda, kaj se vi flue parolas lingvon, kiu ankoraŭ

ne estas subtenata de Duolingo, ekzemple la skotgaelan, aŭ la kroatan, aŭ la litovan, kontaktu al ili kaj proponu viajn servojn.

Kaj faru la esperantan kurson vi mem. Kion vi diras? Vi jam bono parolo Esperanto? Provu la kurson. Eĉ se vi ja jam bone parolas ĝin, vi povas per prepara testo diveni kiom de la kurso vi rajtas pretersalti. Mi tuj atingis nivelon 9 per tiu metodo. Kaj vi? En Duolingo vi povas ankaŭ konatiĝi kun la dekmiloj de novaj lernantoj de Esperanto tra la mondo, signifa aldono al niaj rangoj.

Ed Robertson

Lingvaj Rajtoj

(Prelego dum la skota kongreso en Helensburgh 2015)

Laŭ Vikipedio: Lingvaj rajtoj (aŭ lingvaj homaj rajtoj) estas la homaj kaj civilaj rajtoj temantaj la individuan kaj kolektivan rajton elekti la lingvon aŭ lingvojn por komuniki aŭ en la privata aŭ en la publika sfero, sendistinge per etno, nacieco, aŭ la nombro da parolantoj de lingvo en iu teritorio, precipe en la kunteksto de protektado de minoritatoj kaj indiĝenaj popoloj.

Gravaj dokumentoj por lingvaj rajtoj inkluzivas je la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj, la Eŭropa Ĉarto pri la Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj, kaj la Kadra Konvencio por la Protektado de Naciaj Minoritatoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj, la iranda radio raportis pri iu afero, kiu okazis en dublina superbazaro, kiu dungas komizojn el pluraj landoj. Krom irlandaj dungitoj, la stabaro inkluzivas, inter aliaj, homojn el Pollando, Brazilo kaj Afriko. Kompreneble, ili parolas malsamajn lingvojn, kvankam supozeble, ĉiuj kapablas trakti en la angla lingvo kun la klientaro. La proprietulo de la entrepreno decidis anonci al la dungitoj, ke, pro plendo fare de kelkaj irlandaj klientoj, ne plu estos permesite, ke ili parolu dum laborhoroj siajn lingvojn de origino. Ili devos uzi ekskluzive la anglan, eĉ dum paŭzoj kiam en konversacioj inter si mem. Dum radia intervjuo, la proprietulo devis rekonigi ke tiu malpermeso estis maljusta, ne nur rilate al la eksterlandaj komizoj, sed ankaŭ laŭ la konstitucio de Irlando. Tiu konstitucio deklaras, ke la unua oficiala lingvo de la Respubliko estas la irlandgaela. Sekve, se nur la angla lingvo estus permesita, eĉ irlandanaj dungitoj ne rajtus paroli irlande, kio, li konfesis estus absurda..

La proprietulo do, propravole nuligis la postulon pri la ekskluziva uzo de la angla. Li eĉ agnoskis ke, pro la fakto ke multaj el siaj klientoj devenas de multaj landoj, estas tre utila kaj helpema, ke siaj dungitoj estas plurlingvaj, kaj povas prizorgi tiujn eksterlandanojn en iliaj lingvoj. La intervjuanto demandis kiom da homoj plendis kiam ili aŭdis fremdajn lingvojn, kaj la ĉefo devis konfesi ke temis pri ne plu ol ses personoj.

Bedarinde, precipe - sed ne nur - en angleparolantaj landoj tiu maltoleremo de nekonataj lingvoj estas tre komuna. Ĝis la mezo de la dudeka jarcento, infanoj en Skotlando kaj Kimrio estis punitaj se ili estis aŭditaj paroli la gaelan aŭ la kimran en la lernejo. En Bretonio, uzado de la bretona ne estis tolerata en lernejoj aŭ en rilatoj kun oficialaj instancoj. Francisco Franco, la diktatoro de Hispanio rekonis nur la kastilian lingvon kaj malpermesis oficialan uzadon de la kataluna, la eŭska, kaj eĉ de la galega, kvankam li mem estis ne kastiliano, sed galego. Sovetunio estis multlingva lando, sed ĉiu civitano – devis lerni kaj paroli la rusan. Iom paradokse, rusparolantaj loĝantoj de nun sendependaj landoj, nun plendas, ke ili estas viktimoj de diskriminacio pro la fakto, ke ili devas

lerni lingvoj kiel la estona, latva aŭ litova por esti akceptitaj kiel civitanoj. En Ukrainio, la kieva registaro unue malprudente provis proskribi la rusan lingvon, kiu mi supozas, iom kontribuis al la situacio nun reganta en tiu lando.

Kiam estis fondita la moderna ŝtato Israel oni elektis por la nacia lingvo modernigitan formon de la antikva hebrea, sed la aŝkenazaj judoj, inmigrantoj el norda Eŭropo persiste parolas la jidan, kiun aliaj israelanoj kaj la registaro asociis kun la mizera vivo en la getoj, do ne plu akceptebla. Mi legis pri okazo en Israelo kiam jidparolanta patrino sidis en buso parolante jide kun sia juna infano. Virino, kiu okupis najbaran sidlokon grumble demandis: “Kial vi parolas jide kun via infano? Parolu hebree!” La patrino rebatis: “Se mi ne parolas la jidan, kiel la homoj scios, ke mia filo estas judo?” La jida, ankaŭ nomata la judgermana, estas idiomo kun valora literatura kaj kulturo, kaj parenteze la lingvo de la juda komunumo en Bjalistoko, kie naskiĝis Zamenhof. Dum la Universala Kongreso en Rejkjaviko, Islando, mi havis interesan renkontiĝon kun israela esperantisto, kiu informis min ke li estas lektoro pri la jida lingvo en la universitato de Jerusalemo. Mi esprimis mian surprizon pri la informo ke tiu idiomo estis instruita kaj agnoskita en Israelo, sed li certigis, ke ĝi ne plu estas malrespektata.

Kompreneble, kaj tute prave, ĉiu homa lingvo estas valora kaj nemalhavebla. Kiam la mondo perdas eĉ unu el la idiomo kiu konsistigas parton de la riĉa tapiŝo de la homa socio, ĝi perdas por ĉiam tutan trezorejon de legendoj, kantoj, poezio, historio kaj scienco pri plantoj, kuraciloj, antikvaj teknikoj - kaj enfine tutan kulturon de tuta popolo.

La statuto de la Universala Esperanto Asocio listigas kvar celojn, nome: disvastigi la internacia lingvo Esperanto; agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj; plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj malgraŭ diferencoj de raso, sekso, politiko aŭ lingvo; kreskigi solidarecojn inter siaj membroj, kaj disvolvi inter ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

Pro tio, grava parto de la aktiveco de nia movado estas labori por lingvaj rajtoj en la mondo.

Internaciaj instancoj kiel la Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la Eŭropa Unio pretendas respekti kaj antaŭnigi ĉiujn homajn rajtojn, inkluzive de la lingvaj rajtoj, sed ofte ŝajnas ke tiu celo estas pli ambicia ol reala. La Eŭropa Unio oficiale rekonas la 24 lingvojn de la Eŭropa Unio, sed en la praktiko ĝiaj precipe laboraj lingvoj estas la angla, kaj, kvazaŭ en dua loko, la franca. Ĝi ankaŭ deklaras, ke ĝi rekonas 5 minoritatajn lingvojn, nome la eiska, kataluna, galega, skotgalea kaj la kimra. Tamen, tio signifas nur, ke kelkaj el la dokumentoj de la Unio estas de temp' al tempo eldonitaj en minoritata lingva versioj.

Do, en la praktiko, la angla lingvo iom post iom forpuŝas aliajn lingvojn, kiel, dum la ekzisto de la Brita Imperio kaj la konkerado de Nordameriko, ĝi forpuŝis la lingvojn de la indiĝenoj, kaj ekstermis iliajn kulturojn kaj sociojn. Sekve la angla lingvo estas ofte priskribita kiel glotofaga lingvo: tio estas lingvo kiu voras kaj detruas aliajn lingvojn. Kompreneble, tia detruo ne estas la intenco de instruantoj de la angla.

Oni neniam devus subtaksi la gravecon por ĉiu individuo de lia hejma, familia aŭ etna lingvo. Eĉ lingvo, kiu dum longa tempo ne plu estis parolata povas esti nostalgie reserĉata de la homoj. Elstara ekzemplo estas tio de iu manksa viro, D-ro Brian Stowell, kiu antaŭ kelkaj jaroj ricevis la tiel nomata Tynwald Honour por sia kontribuo al la maksa kulturo. Li estas rigardata kiel la persono, kiu plu faris por restari la supozeble mortinta manksa lingvo

Eble eĉ pli rimarkinda estas la revigligo de la kelta lingvo de Kornvalo, kiu oni supozas tute mortinta ekde la fino de la 18-a jarcento. Denaskaj kornvalanoj tre ŝatas sian heredaĵon, kaj lastatempe eksterordinaire kreskis la intereso pri la kornvala, kaj kresko de la studado kaj uzo de la lingvo en tiu malgranda duklando. Ne nur la konsilantaro de Kornvalo apogas la lingvon, sed ekde la jaro 2002, ĝi estas oficiale agnoskata de la brita registaro, kiel minoritata lingvo sub la Europa Aĉarto por regionaj aŭ minoritataj lingvoj. Ĝis antaŭ nelonge, la kornvala estis klasifikita inter la formortintaj lingvoj, sed UNESCO lastatempe promociis ĝin al la kategorio de “kritike endanĝerigitaj lingvoj”, do ĝi ne plu estas rigardata kiel malaperinta. Tio granda estas la amo kaj respekto, kiu iu popolo povas montri al la lingvoj de siaj antaŭuloj.

En Skotlando, ni havas du indiĝenajn idiomojn, krom la angla. La plej antikva estas la gaela; la malpli antikva, la skota. La ĉeesto de gaelaj loknomoj en tuta Skotlando (krom la Nordaj Insuloj kaj la ekstrema sudoriento) klare montras, ke iam ĝi estis la ĉefa skota lingvo. Post la restaro de la skota nacia parlamento en 1997, la gaela havas certan oficialan statuson. Ŝajnus juste koncedi oficialan statuson al la skota, sed tio estigas kelkajn problemojn. Ne ĉiuj konsentas, ke la skota estas aparta lingvo. Plie ĝi konsistas el pluraj lokaj dialektoj kaj variantojn, ekde angla lingvo kun skota prononco ĝis la tiel nomata nordorienta “Doric” kaj la aparta, kaj iom arkaika lingvo proponita kaj apogata de la Scottish Language Association (Skota lingva asocio). Normigita skota ne ekzistas. Por ofialigi la skotan, tiuj problemoj devus solviĝi.

Kvankam Esperanto ne estas etna aŭ nacia lingvo, en la pasinteco, la rajto uzi ĝin estis neita en diversaj landoj. Tio okazis en Portugalio dum la regado de Salazar, en Hispanio sub Franco, kaj en Sovetunio sub Stalino. kaj plurfoje esperantistoj estis persekutitaj. Pri tio oni povas legi en la libro La danĝera lingvo de Ulrich Lins.

Nun, en Irako, batalantoj de la tiel nomata “Nacio de islamo” estas detruantaj la valoregajn arkeologiaĵojn en la lulilo de nia civilizacio, do efektive nuligante nian historion. Se ni ne protektas la endanĝerigitajn lingvojn kaj kulturon de la homaro, ni estos kulpaj pri simila vandalismo. En la strebo por savi tiujn trezorojn, la esperanto movado povas kaj devas ludi signifan rolon.

Girvan McKay

Tradukaj Defioj

Dum multegaj jaroj Bill Auld, kiel redaktoro de La Brita Esperantisto, enmetis tradukan rubrikon en ĉiu numero de tiu organo. La leganto(j) kiu(j) resendis la laŭ li plej bonan Esperanto-version ricevis premion de libro. Ni ne povas proponi konkretan premion, sed ni esperas ke vi volos strebi al la honoro ke via provo estu juĝata la plej bona! Ni fakte volas starigi du defiojn: tradukon el la angla en Esperanton kaj, inverse, tradukon el Esperanto en la anglan. Ed Robertson juĝos la enesperantigojn kaj Hju Rid juĝos la enangligojn.

Venu, do, tradukemuloj! Streĉu viajn interpretajn muskolojn cerbajn kaj sendu al ni viajn plej bonajn penojn!

Jen la du tradukotaĵoj:

A. La Prezidanto kalkule rigardis la kurbantajn vicojn ĉirkaŭ si, kaj ekparolis:

"Cent okdek tri," li konfirmis kun kapjeso. "Kurso Veda 301 ĉeestas jam kompleta. Nun lastan fojon mi rigardas vin, kursanoj. Nun lastan fojon mi nomas vin kursanoj. El origina mil – cetere mil elektitoj – nun sole restas vi; do ne necesas diri ke mi sentas ankaŭ bedaŭron vin adiaŭante, eliton el elito. Nur dufoje antaŭe dum mia kariero ĉi tie okazis ke pli ol cent kvindek kursanoj restis ĝis la fino. Miajn gratulojn do.

Kaj nun efektive la momento de mia adiaŭo, ĉar mi neniam plu renkontos vin kiel ordinarajn homojn. Transdonante la parolon al la Ĉefadministranto, mi petas ke vi ekprenu la insignon de via rango."

Halman obeo tuŝis paneleton sur sia pupitro, kaj kvadrata sekcio silente malsuprenglitis, por reaperi post momento, lasante nenion videblan sur la glata surfaco. Sur ĝi kuŝis du objektoj: malgranda slipo kaj peco de papavkolora materialo. Enpoŝiginte la slipon, Halman malfaldis la materialon por montri specon de senbutona veŝto, kiun li surmetis per facila movo, lasante al la fleksebla ŝtofo algluiĝi sen tordo aŭ sulko. Ĉirkaŭ li cent okdek du homoj faris samon, kaj li konsciis la unikecon de tiu amaso da ruĝo. Kaj ne sole li, ĉar la Ĉefadministranto ĝin tuŝis per siaj unuaj vortoj.

"Intendantoj," li diris, kaj Halman bridis leviĝantan fieron je la titolo.

- El 'Misio Sen Alveno' de John Francis

B. Only half a decade after a 4,000-year-old tuft of hair yielded the first ancient-human genome, researchers are starting to sequence ancient genomes by the dozen, much as they do with modern genomes.

Such population-scale sequencing is answering long-standing questions about the Eurasian Bronze Age. This tumultuous period between about 3000 BC and 1000 BC saw new technologies

and cultural traditions — from the use of finely crafted weaponry and horse-drawn chariots to changes in burial practices — spread across Europe and Asia, starting in the steppe between the Black Sea and the Caspian Sea.

As DNA data flood in, researchers say, the mass-genome approach will paint an increasingly accurate picture of the past and show how ancient events shaped modern humanity — from what we eat to the diseases that ail us. “Hell, what does this mean?” says Greger Larson, an evolutionary geneticist at the University of Oxford, UK. “In another five years, we’ll be talking about tens of thousands of ancient genomes.”

The dawn of ancient population genomics is the result of cheap DNA sequencing and the rise of boutique lab techniques that can separate highly degraded ancient DNA from contemporary contaminants.

– <http://www.nature.com/>

Bonvolu sendu viajn provojn al la sekvaj retadresoj:

en**Esperantigoj** al ed-robertson@teleosvet.co.uk; en**Angligoj** al hju_rid@yahoo.co.uk.

Kalendaro

27. junio - 4. julio

[Roskilde-Festivalo 2015](#) - en Roskilde, Danio. Partoprenu senpage en la plej granda muzikfestivalo de Eŭropo kun ĉ. 110.000 partoprenantoj, inter ili ĉirkaŭ cent (espereble) esperantistoj. Vi kiel volontulo laboros kvarfoje 8 horojn, do 32 horojn dum la tuta semajno. Ni donas bazejon kun sofoj, senpagan manĝon dum tuta semajno kaj tendojn. inf.: FestoKlubo kaj Dana Esperantista Junulara Organizo roskildefestivalo@gmail.com

21 - 25. julio

[Bicikla Karavano de Parizo al UK en Lille](#) - en Parizo - Lille, Francio. Okaze de la venonta 100-a UK, ni biciklas de Parizo al Lille. (275 km. ebena lando, 60-70 km. tage; 4-5 tagojn). Inf.: Annarosa Andrei annarosa@kri.it

23. julio - 2. aŭgusto

[Milan Zvara piedmarŝo](#) - en Karpata montaro, Ukrainio. Esperanto-piedmarŝo de la vilaĝo Dovhe, (kie naskiĝis la fama slovaka esperantisto Milan Zvara en Zakarpata provinco,) al la plej alta monto de Ukrainio Hoverla. Inf.: Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kiev-133, Ukrainio, UA-01133. Rete: volodomir@ukr.net

25. julio - 1. aŭgusto

[100-a UK, Universala Kongreso de Esperanto](#) - en Lille, Francio

2 - 9. aŭgusto

[Internacia Junulara Kongreso, IJK](#) - en Wiesbaden, Germanio. La Internacia Junulara Kongreso de TEJO estas la ĉefa renkontiĝo por junuloj. Interesaj tagaj programoj, ekskursoj, vespere koncertoj, dancado, amuzo kaj bona kompanio! - Facebook-paĝo: <https://www.facebook.com/junularakongreso>. Inf.: Organiza teamo, Alex Raymond, rete:alekcxjo@gmail.com, tel: +00-0

7 - 16. aŭgusto

[Renkontiĝo de Amikoj - 10](#) - en Krasnojarsk kaj Hakasio, Rusio. **Ĉu vi sciis, ke oni havas Siberian "Stonehenge"?** Ĉu vi jam subteriĝis je 38 metroj? Ĉu vi iam flosis laŭ la rivero inter esperantistoj? - La 10 jubilea arangxo de Novosibirska Esperanto klubo. Cxi-foje en Krasnojarska regiono kaj Hxakasio. Dum 10 tagojn vin atendas ricxa ekskursprogramo kaj du-taga flosado laŭ rivero Mana apud Krasnojarsk per komfortaj duetaĝaj flosoj laŭlonge 80 km-ojn! ([Foto](#)) - La 9-an ni venos al turisma bazejo "Cejano" ĉe lago Itkul apud lago Ŝira, kie okazos varia Esperanto-programo. La 15-16-an okazos ekskursoj kaj aliaj Esperanto programeroj en Krasnojarsk. Inf.: Katerina Arbekova, RU-630064 Novosibirsko, Bluĥera 24-28, Rusio. Rete: katka8@ngs.ru, tel.: +7 (383) 3468494, poŝ-telefono: +7 913 9219498

7 - 18. aŭgusto

[Acora Esperanto Kurso](#) - en Ponta Delgada (Acoroj), Portugalio. Baza esperanto kurso por enloĝantoj de la paradizo kaj vizitantoj. Ĝus komenciĝis malmultekostaj flugoj de Londono, Lisbono kaj Porto ;-). Inf.: Andi Plaza, Antonio Cuéllar Gragera, 9 - 4º izqda ES-06003-Badajoz, Hispanio. Rete. andi_plaza@hotmail.com

8 - 15. aŭgusto

[88a SAT-Kongreso](#) - en Nitra, Slovakio.

